


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 593 (4)

APRILLO 1955



Liberia infano vakcinata kontraŭ variolo

(Organizo Monda de Saneco, p. 115)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Jara abono (1955) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Helpredaktoro : R. ROSSETTI
39 Willows Cres., Birmingham 12, Anglujo

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅛ paĝo 15 ŝil.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-kupono por ĉiu duo da vortoj

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Legantoj en 80 landoj**Eldonnumero 7000**

Enhavo

	paĝo
La nuna pozicio de nia movado : <i>Hans Jakob</i>	105
Rapida promeno tra Bolonjo : <i>Lucia Tadolini</i>	107
Organizaĵo Monda de Saneco : <i>trad. P. Bouvier</i>	115
Nederlando "E 55" : <i>M.V.</i>	121
Poemo : Papilio : <i>P. Bezruč, trad. R. Hromada</i>	114
Desegnaĵoj : <i>Dragutin Wranka</i>	123, 127
Konstantaj rubrikoj :	
Tra la mondo esperantista	109
Laboro kaj sukceso : <i>C. Støp-Bowitz</i>	111
Nekrologo	120
E-ista vivo en la lokaj grupoj : <i>J.G.</i>	124
Enigma konkurso n-ro 97	128
Nia Forumo	129
40-a Universala Kongreso, oficiala komuniko n-ro 5	131
Radio	133
Oficiala informilo	134
Internacia konkurso 1955	136

La libro pri li**HANS CHRISTIAN ANDERSEN**

liaj vivo kaj verkoj
verkita de Chr. Heilskov.
63 p. ilustrita, tre interesa.

Prezo 2ŝ. 9p.

Mendebla ĉe U.E.A. aŭ
Libro-servo de C.D.E.L.,
Hørsmarksalle 5, Risskov, Danlando

Internaciaj Feriaj Esp-Kursojen **Helsingør**, Danlando,

okazos 17-24 de julio, 1955

Kursoj : Daŭriga, konversacia, preparo
por Cseh-metodaj instruistoj—kaj por
infanoj.

Prospekto havebla ĉe :

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

Revuo ESPERANTO Internacia

N-ro 593

Aprilo 1955



La nuna pozicio de nia movado en la mondo

LA rezolucio de la UNESKO konferenco en Montevideo signas komencon de nova epoko en nia movado. Post tiom da jaroj de sindona klopodado de miloj da idealistoj, internacia instanco dotita je nekontestebla aŭtoritateco resumis post diskutado **faktojn** pri Esperanto, ĝia valoro kaj ĝia signifo. Por konfirmi tion, UNESKO vicigis UEA en la cirklon de sia agado, karakterizante UEA kiel “**konsultan organon**” en la sferoj interesantaj ambaŭ. Tio signifas implicate, ke **nur** Esperanto estas lingvo internacia, kiu povis krei movadon universalan, entute ĉion kion posedas nacia lingvo—tradicio, literaturo, evoluebleco.

Tiu-ĉi decido metas nin nun antaŭ grava demando, nome pri la pozicio de nia movado en nuna mondo, dividita nete en du blokoj. Signifa ja estas ke precize tiuj landoj, kiuj ludis atentindan rolon en nia afero, la regnoj en orienta Eŭropo, ne plu estas inter ni. Ripetiĝas en tiu-ĉi kazo fenomeno ofte konstatita en la homa historio, ke progreso socia aŭ alie ĝenerala estas akompanata de la malo, parte reduktante la efikon de l'unua. La foresto de la regnoj popol-demokrataj en la internacia koncerto, precipe en kunligaj penadoj estas grava faktoro. Ni povas ĝin konstati kaj, bedaŭri, sed nenion pli.

Nia movado estas universala, ĝenerala, socia kaj humaneca. Tial nia sinteno en politika vidpunkto devas esti nepre *neŭtrala*, rilate al la nuna konstelacio politika. Iam la Sovjeta Respublikaro favoris nian ideon; ekzistis eĉ referanto pri Esperanto en la centra registaro sovjeta. Tiu ĉi sinteno de kolosa regno, dotita je lingvaj minoritatoj ja estis senrezerve aprobita de ni, laŭ esperantista vidpunkto. Ĝi havis nature alian efikon ĉe aro da registaroj, por kiuj Esperanto kaj nia movado estis revolucia en politika senco. Pruvo pri tiu ĉi sinteno estis ekzemple opozicio de la Franca registaro, la broŝuro de la brazila delegito, okaze de la diskutoj pri Esperanto en la Ligo de Nacioj, la parte malfavora prijuĝo de la itala registaro, kio ree influis aliajn registarojn.

El la spertoj de l'pasinto ni devos lerni. Se hodiaŭ nia movado ekzistas nur en okcidentaj landoj kaj ne plu en la alia bloko, tio certe ne estas nia kulpo. Povos esti, ke iam oni kredigos ke nia movado estas sub usona influo, sekve kontraŭ la popoloj de la alia bloko. Ni ne povos tion malhelpi, nia povo estas limigata. Sed kion ni povas kaj eĉ devas, tio estas resti sendependa kontraŭ ĉia provo nin tiri en situacion, kiu povus supozigi nin unuflankaj. Eviti ĉion kio disigas, sed kunhelpi ĉion kio kunigas! La uzo de nia lingvo por kia ajn celo estas libera, sekvo ni ne malaprobu tian faron de registaro kies politika koncepto ne konformas kun la nia.

En la jaro 1905 okaze de la unua kongreso ekestiĝis tiu ĉi problemo: **difino de l'Esperantismo**, la limigo de ĝia agado. La nuna situacio en la mondo politika kaj lingva necesigas novan deklaron pri Esperantismo, kiu samklare difinas ĝian rolon. Forta apogo morala estas por ni la decido de la UNESCO-Konferenco en Montevideo.

Hans Jakob

INTERNACIA GEOGRAFIA ASOCIO

Multaj esperantistoj estas aktive aŭ pasive interesitaj pri geografio, estas membroj de naciaj geografiaj societoj kaj abonas tiajn revuojn, sed ne miksas siajn geografiajn aktivecojn kun Esperanto. Samtempe, aliflanke, nia Movado bezonas aron de geografoj diverslandaj, kiuj povus en aktiva kunlaborado krei geografian terminaron, interkonsenti kaj proponi al la koncernaj lingvaj instancoj geografiajn nomojn por forigi la nunan ĥaoson, eldonadi ĵurnalon kiu kunligus la geografiamantojn kaj, fine, ekagi por la enkonduko de Esperanto en la faka medio de geografoj.

Por tiu celo mi taksas nepre necesa la fondon de Internacia Geografia Asocio, kiu povus esti fako de ISAE, aŭ esti sendependa, laŭ la deziro de la interesitoj. Por preparoli la eblecojn de la fondo de tia Asocio, mi kunvokas kunvenon de profesiaj kaj amatoraj geografoj dum la 40-a Universala Kongreso en Bolonjo, en tago, horo kaj loko fiksitaj de LKK. Kiuj ne povos ĉeesti, bonvolu kontakti per-

letere kun la subskribinto, en la C.O. de UEA:

Tibor Sekelj, membro de la Brita Reĝa Geografia Societo

AGADO EN PROKSIMA ORIENTO

Kiam tiuj ĉi linioj alvenos al la leganto, komence de aprilo, mi estos vizitanta Jugoslavion, la landon en kiu komenciĝas mia agado favore al Esperanto en la proksimorientaj landoj, kiel speciala sendito de UEA, laŭ projekto jam publikigita. Laŭ la nuna stato de la afero, akompanos min dum la vojaĝo kvar kunlaborantoj.

Helpo. Kiel jam anoncite, mi ne intencas peti materian helpon de UEA, kaj ankaŭ mi rezignas pri kreo de speciala fondaĵo favore al tiu agado. Tamen APO estos dankema al ĉiu memvola kunhelpanto. Kun danko mi kvitancas la donacon de U.S. \$10.— alsenditan de S-ro Frank W. Vedder, Miami, Fla., Usono.

*Lic. Tibor Sekelj (APO)
ĉe la C.O. de UEA.*

Lucia Tadolini

Rapida promeno tra Bolonjo


RAPIDAJ scivolaj vizitantoj, ni trovis la urbon ankoraŭ dormema. Estis festotago kaj la bolonjanoj sin malstreĉis en la varmeto de la domoj. Ni en tiu mateno de jam malvarmeta aŭtuno estis pretaj por “konkero de Bolonjo”.

Nin frapis la malpleneco de la stratoj. Ili aspektis pli larĝaj, kaj la unuaj sunradioj desegnis la ombron de la kolonoj en la longaj arkadaroj tiel ke ili donis en kelkaj partoj impreson kvazaŭ de grandaj dormetantaj klostroj.

La eleganta tre pura ĉarmo de *Piazza Maggiore* (la ĉefa placo), ĉirkaŭata de arkitekturaj mirindaĵoj, nin revokis al nia turisteco.

La gvidisto indikis al ni la Komunuman Palacon kaj li substrekis la ĉarmon de hela madoneto el terakoto, verko de Nicoló dell' Arca. Granda bronza statuo superstaras la enirejon de la palaco: temas pri Papo Gregorio 13-a, fama bolonjano. Tamen se oni iom malicete demandas ian parton de la bolonjanoj, kiun tiu statuo bildigas oni kutime ricevas la respondon: “San Petronio”. Fakte Sankta Petronio loĝas apude en la belega baziliko kiu, laŭ la komenca projekto estus devinta fariĝi la plej granda templo de la tuta kristana mondo.

Ni revenu sur la placon. Nin salutas la vigla flugo de la kolomboj. Ni observas *Palazzo dei Notai*, kaj *Palazzo dei Banchi*: ŝatinda verko de Vignola surstaranta sur la tiel nomata “portikodeflorvendistinoj”. En la pura ĉielo aŭtuna konturiĝas la “Torre dell' Arengo” (Turo de la Popolkunveno) superstaranta la iaman urbeŝtran palacon kun la multjarcenta sonorilego, kiu per sia bronza voĉo fortaktis tiom da solenaj horoj en la urba vivo.



Ĉirkaŭirante la palacon al *Piazza Re Enzo* ni eniras en “Vultone del Podestà” (Urbestra Volbego) kaj ni alvenas flanke de la fontano de la “giganto”. Ĝi belege enkadriĝas en la arkaĵo de la Volbego sur la fono de la ĝemelfenestroj de la Komunuma Palaco. Mirinda grupo de infanoj, delfenoj kaj sirenoj estas kadro por la impona beleco de “Nettuno” (Neptuno), verko de Giambologna, kiu en la malpeza moviĝo de la bronzaĵo ŝajnas malsuprenvenanta de sia piedestalo por doni al ni ĝentilan bonvenon ĉe la susuro de naŭdek kantemaj akvoŝprucoj.

Ni turnas nin al *Palazzo Re Enzo* (palaco de reĝo Enzo). La ombra korto kun la gracio de sia puto kaj de la ŝtuparaj arkadoj rakontas al ni pri la ekzilo de Enzo, reĝo de Sardinio, filo de Frederiko II-a, milite kaptita en 1249; kaj ni ne trovas malakordaj kun la harmonio de la muroj la cent diversajn kreskaĵojn, kiujn floristo tenas tie ŝirmatajn.

Poste nia tre rapida trakuro portas nin de unu al la alia flanko de la urbo por rikolti ĉe la preterpaso tion, kion la vido proponas al ni.

En la Preĝejo de *San Domenico*, ni admiras la belegan *Arca* (tombokofro) kiu enhavas la restaĵojn de la sanktulo. Revenante al la koro de la urbo ni ŝatas haltigi la rigardon sur *Palazzo della Mercanzia* (palaco de la komercistaro) kaj poste turni ĝin al tio, kion ni povus nomi la insigno de la urbo: la du turoj “Asinelli” kaj “Garisenda”. Kliniĝante laŭ du malsamaj direktoj ili havas en sia kurioza proksimeco ion konatan, kiu revokas al nia menso karikaturon ie viditan en kiu la du turoj, transformitaj je popolaninoj kun okulfrapaj kaptukoj, gaje ridas pri urba okazaĵo.


La portiko de la preĝejo “dei Servi” kaj la preĝejo mem, la urba ĉefpreĝejo de *San Pietro*, la preĝejo de *San Francesco*, la Baziliko de la Virgulino de *San Luca* kun la longa portikaro supreniranta ĝis la templo en sinsekvo de belaj vidaĵoj, restas vivaj en nia memoro. Nek povas ni forgesi la Urban Teatron (Teatro Comunale) kun ĝia muzika gloro, kaj la faman malnovan Universitaton, kiu donis al la urbo la titolon “klera”. Kaj ĉar oni sekvigis ĉi tiun epiteton per alia—“grasa”—por klarigi ĝin ni serĉis kaj trovis dum la kura vizito al portikoj kaj kolonoj la plej aŭtentikajn manĝejojn, kiuj konfirmis al ni, kiel frandemaj estas bolonjanoj.

Kaj tiel, inter admira rigardo al la punto de kornico forgesita ĉe la supro de ruina domo, kaj verda halto en *San Michele in Bosco*, la monteta supro de kie oni ĝuas ravan super-rigardon al la urbo, nia mallonga restado forflugis kiel sorĉo. En la memoro vivecas sinsekvo de pintaj cipresoj sur flanko de monteto.

“Sed mi ĉefe amas ĝin ĉar ĝi estas bela” ni pensas kun Carducci. Bela en siaj harmoniaj monumentoj, en siaj preĝejoj, en sia turo gardostaranta al la ĉielo, en la perfekta gracio de siaj virinoj kun belaj kaj iom mal-varmaj vizaĝoj, en sia laŭtsonora dialekto, kiu gustas je kanzono kaj kelkfoje je sufokita rido: kaj ĉio kunfandita en la vivan kaj malhelan koloron de oreca bronzo.

Mi petas indulgon de la multaj—eĉ tre multaj—amikoj, kiuj skribis al mi kaj ne ricevis respondon. Kun ĉagreno kaj memriproĉo mi vidas amasiĝi tiujn leterojn, kiujn ĝis nun mi fizike ne povis kvitanci. Mi esperas baldaŭ likvidi la prokraston. Dume—paciencon kaj pardonon!

R. Rossetti, helpredaktoro.



Tra la Mondo Esperantista

Ni petas regulajn raportojn aŭ raportetojn el ĉiuj mondpartoj por tiu ĉi rubriko, por ke ĝi prezentu tutampleksan bildon pri agado, eventoj kaj interesaĵoj el la Esperanta mondo.

Aŭstralio

Esperanto ĉe Olimpiaj Ludoj

Niaj agemaj aŭstraliaj samideanoj entreprenas loĝigon de esperantistoj partoprenontaj la Olimpiajn Ludojn en Melbourne dum Novembro 1956. Ili avertas, ke ĉiuj hoteloj estas jam rezervitaj por eksterlandaj ĵurnalistoj kaj radio-raportistoj. La atletoj kaj sportfakuloj loĝos en "Olimpia vilaĝo". Al la esperantistoj oni proponas gastigon (ev. senkostan) ĉe samideanoj, salutvesperon, specialajn ekskursojn. Partoprenontoj skribu tuj al *Aŭstralia Esperanto-Asocio, Box 2122 T, Elizabeth St., Melbourne, Aŭstralio*. Ordinara letero el Eŭropo vojas 6-7 semajnojn, flugpoŝta 8-12 tagojn. Oni nepre aldonu reafrankon: por ordinara letero 1 rkp, por flugpoŝta 2. Kiuj deziras havi teknikan informon pri la Ludoj mem, skribu rekte al: *Olympic Organising Committee, Melbourne*. Sur la koverto kaj je komenco de la letero indiku: *Lingvo uzata—Esperanto*.

La model-ekspozicio, preparoj marŝas

En la granda ekspozicio de modeloj en Melburno (vd. Jan. n-ron p. 8) estas speciala Esperanto-stando, en kiu ĉiu elmontraĵo havos karton kiu indikos en Esperanto la historion de la modelo, nomon de la konstruinto, landon de deveno ktp. Bonvolu sciigi rapide pri sendotaj modeloj (maketoj), pri kontaktoj kun model-

konstruantoj. Ni bezonas scii plejeble baldaŭ pri grandeco de la modeloj, por ke ni povu aranĝi taŭgan spacon. La modelojn ni resendos poste niakoste. Intereso jam estas granda. La ekspozicio nepre estos impona. Kiu ankoraŭ deziras informojn bv. skribi al ni flugpoŝte: ni same respondos. Adreso *Aŭstralia Esperanto-Asocio*, kiel supre.

Lingva servo

Estas ĝene, se vojaĝantoj sur fervojo volas urĝe aĉeti la semajnan abonbileton lunde matene, anstataŭ prudente la antaŭan sabaton aŭ dimanĉon. Kaj se temas pri nov-aŭstralianoj estas malfacile komprenigi al ili tion. En Cannington, Okcidenta Aŭstralio, loka esperantisto S-ro Dean helpis la staciestron en lia embaraso. Li pretigis anoncon polan, poste unu germanan, poste italan, kaj ankaŭ, kial ne?—Esperantan. Do nun la avizo aperas en kvin lingvoj apud la stacidoma giĉeto.

Belgujo

Dank' al la persvada forto de la sukceso en Montevideo, kurso kun 50 pp. funkcias en la teknika lernejo de Verviers. Por kuraĝigi la Direktoron, kiu mem petis la kurson, kaj por instigi aliajn lernejestrojn fari same, oni sendu dankon kaj gratulon al: S-ro Henri Lecomte, Direktoro de la Provinca Teknika

Lernejo, 69 rue de Laines, Verviers, Belgujo.

Ĉeĥoslovakio

La persista kaj frukta agado de niaj ĉeĥoslovakaj samideanoj estas modelo por anaroj en pli favoraj konjunkturoj. En Olomouc dum Januaro okazis 5-taga seminario kun programo, labora kaj kultura, sur enviinda nivelo. Je la 6-a tago sekvis laborkonferenco en kiu oni fondis konsilantaron por pli firma interrilatado de la grupoj, kaj anoncis aperon de presita gazeto *Nia Spegulo*. Kun admiro ni gratulas al la **122** delegitoj pro la digna kaj reala laboro plenumita.

Hungarujo

La revigliĝo de la movado en Hungarujo ankoraŭ ne sukcesis, tamen kelkaj signoj montras, ke la uzado de la lingvo ne ĉesis, kaj kelkaj entuziasmoj klopodas vigle kunmarŝi en la tutmonda movado, tenente la eblajn rilatojn amikajn kaj kulturajn.

Ĉeĥoslovaka samideano vizitis la esperantistojn en la urbo Hódmezővásárhely, kie oni amike kaj ĝoje pasigis mallongan tempon en intima kunesto. Kelkdekoj grupiĝas en la lando ĉirkaŭ la Mondpaca Esperantomovado, kies revueto, eldonita en ĉiu monato en alia lando, *La Paco*, rondiras inter ili. Duloke instruistoj eĉ havas negrandan lernejan kurson. Kelkaj uzis la kunvenojn de la pac-komitatoj por tie konigi sciigojn venintajn el diversaj landoj, samtempe konigante la utilan kunagadon per Esperanto.

Ĉiu gazeto, presaĵo, prospekto, libro, kiu venas el alia lando de amikoj komprenemaj, estas avide akceptata, ĝoje legata, kiel trezoro. En urbeto oni maŝinskribe kopiis du

librojn de Baghy, por povi prunte cirkuligi ilin inter legemuloj.

Okaze de la 64-a naskiĝtago de Julio Baghy, kelkaj ges-roj kunvenis por modesta soleno. Inter ili estis ankaŭ Kalocsay, kiu konigis la diplomatan lukton kaj sukceson ĉe Unesko.

Kanariaj Insuloj

J. Régulo Pérez (ĉe la Universitato de La Laguna) stimulis per kelkaj leteroj en la gazetoj tiel grandan intereson pri Esperanto, ke oni nepre petis lin starigi kurson. La unuan lecionon ĉeestis 41 personoj: inter ili du universitataj katedraj profesoroj, liceaj kaj instruistaj katedraj profesoroj, unu pastro, tri kuracistoj, la konsulo de Venezuelo kaj lia aŭstra edzino, ses geinstruistoj kaj multaj universitataj studentoj. Al la dua leciono venis ankoraŭ 10 personoj. Oni kursas dufoje semajne. Gratulon!

Pollando

De la 30-a de Julio ĝis la 14-a de Aŭgusto 1955 okazos en Varsovio *Festivalo de la Tutmonda Demokrata Junularo*. Oni antaŭvidas partoprenon de ĉ. 50,000 gejunuloj el 60-70 landoj. Estas inde, ke ĉiu esperantista partoprenonto kaj nepartoprenonto en la Festivalo skribu al siaj landaj Festivalaj komitatoj petante okazigon de Esperanta kunveno kaj uzadon de Esperanto. Skribu al la Organiza K-to de la *Festivalo de la Tutmonda Demokrata Junularo*, Warszawa, Molotowska 3. Jen ŝanco helpi la movadon en la lando de la kreinto de Esperanto! Multnombraj skriboj atestos pri nia komuna forto. Informu la Asocion de Esperantistoj en Pollando, Warszawa, Marszałkowska 81, pri via partopreno en la Festivalo.

LABORO KAJ SUKCESO

Kun la intenco disvastigi la spertojn de la landaj asocioj, kiuj en la lastaj jaroj havis bonan progreson, mi petis la prezidantojn de tiuj asocioj rakonti pri la metodoj uzitaj, por ke aliaj esperantistoj povu utiligi ilin laŭ la cirkonstancoj. En tiu ĉi numero ni publikigas kelkajn partojn el la raporto de la prezidanto de Norvega Esperantista Ligo (NEL), s-ro Støp-Bowitz. Lian kompletan raporton, multobligitan, la landaj asocioj ricevos de UEA.—Kaj nun mi donas la vorton al s-ro Støp-Bowitz.

E. Malmgren.

Ĝenerale

La bona rezulto de la agado de NEL dum la lastaj 10 jaroj dependas miaopinie de la jenaj faktoroj:—

1. Solida, glate funkcia organiza de la landa asocio, kiu per aglaj okuloj observadas la agadon de la kluboj kaj ĉiam tuj klopodas helpi, se necese.

2. Sisteme funkcia varbado al ĉiuj interesigantoj.

3. Kontinue funkcia gazetara servo.

4. La feliĉa hazardo ke ĝuste dum tiuj jaroj estis favoraj cirkonstancoj por la kursagado.

5. La efiko de la Universala Kongreso en Oslo.

6. La fakto ke ni fidis nur niajn proprajn ekonomiajn rimedojn kaj reguligas nian agadon laŭ la principo atingi la plejebelon en la kadro de ili.

Administrado

NEL havas malgrandan oficejan ĉambron kun telefono. Sed ni ne



Esperanto en Orienta Germanujo. La bildo montras grupon da samideanoj sur Zamenhofstrato en Dresden-Leuben. Ĉiumonate okazas amikaj kunvenoj, ĉiam en alia loko. Daŭras instruado de la lingvo kaj ampleksa korespondado kun eksterlando (unu amiko havis interligon kun 32 landoj). Ni ĝojas pro la daŭra viglado de la samideanoj kaj etendas al ili nian koran, solidaran saluton.

havas dungitajn, salajratajn oficistojn. Ĉiun laboron sekve devas fari la estraranoj senrekompence dum siaj liberaj horoj. Por iom dividi la laboron ni elektas specialajn komitatojn, komisiitojn aŭ fakajn sekciojn por prizorgi difinitajn, daŭrajn taskojn aŭ la propagandon en difinitaj rondoj. La pli gravaj estas : Estro de koresponda instruado, Biblioteko, Komisiitoj pri Blinduloj, Skoltoj, Radio, Unesko kaj Eŭropa Konsilantaro, Ekzamena Komisiono, Turista Komisiono, Gazetara Servo, Estroj pri ĝenerala propagando kaj pri loka propagando, Faka sekcio de instruistoj. Ĉiu el ili devas al la estraro de NEL sendi detalan jar-raporton pri sia laboro, kaj tiuj raportoj formas la bazon de la ampleksa jarraporto pri la tuta agado de NEL, kiun la estraro kompilas kaj dissendas en multobligita formo ĉiujare unu monaton antaŭ la jar-kunveno.

Laboro de kluboj

La klubojn oni povas dividi laŭ du ĉefkategorioj : (a) pli malpli novaj, malgrandaj kluboj, kies membraro tute aŭ ĉefe devenas de unu sama kurso kaj sekve troviĝas sur proks. sama lingva nivelo, (b) malnovaj, pli grandaj kluboj, kies membraro, konsistas el miksaĵo de perfektuloj, progresintoj kaj komencantoj. La programoj de la unua kategorio enhavas ĉefe lingvan studadon. Sed ni klopodas instigi tiujn klubojn enmiksi ankaŭ distrajn programerojn, por ke la membroj ne tediĝu. Kiam la klubo kreskas, per partoprenintoj de novaj kursoj, la klubo jam apartenas al la dua kategorio, car la lingva nivelo de la membroj estos malsama. Tiam ni rekomendas, ke la klubo aranĝu tutklubajn kunvenojn nur malofte, ekz. unufoje ĉiumonate,

kun programo konsistanta el kulturaj kaj distraj eroj, kaj dividi la membraron laŭ la lingva nivelo en studrondojn, kiuj kunvenu dum la ceteraj semajnoj por perfektigi sin.

Kursarangoj kaj studlaboro

En kursoj por komencantoj ni aplikas precipe la Cseh-metodon, kiu cetere estas la sole uzebla por eksterlanda instruisto, kiu ne konas la landan lingvon. (NEL dum multaj jaroj dungis eksterlandajn instruistojn por siaj kluboj.) Sed validas la ĉiea plendo, ke tro malmultaj el la kursanoj fariĝis daŭraj esperantistoj. Ĉi tie ne estas la loko por analizi la kaŭzon de tio, sed estas fakto ke multaj norvegoj, kiuj gvidas kursojn en siaj hejmlukoj, preferas lernolibrojn. Tamen pli granda procentaĵo de daŭraj esperantistoj post tiaj kursoj ĝis nun ne estas statistike konstatita. Ĉiuokaze ni ĉiam klopodas post kurso por komencantoj okazigi daŭrigan kurson. Se loka kapablulo ne ekzistas, oni devas helpi sin per lernolibroj aŭ per la koresponda kurso. Por helpi konservi la intereson de la komencintoj dum la unua tempo post la kurso ni liveras al ili dum duona jaro nian organon Norvega Esperantisto. (Tiu aranĝo kostas al NEL proks 1 anglan ŝil., sed tiu sumo ĉiam estas enkalkulita en la kurskotizo.)

Gazetara Servo

Nia Gazetara Servo dufoje en ĉiu monato sendas novaĵojn pri Esperanto al ĉiu norvega taggazeto (proks. 200). Per eltonda oficejo ni abonas la eltondaĵojn pri ĉio kio aperas en la gazetoj pri Esperanto kaj la mondlingva demando entute. Dum la jaro 1954 pli ol 1,000 tiaj notoj kaj artikoloj aperis en la novega gazetaro.

Festtaga Konkurso

NI verdire ne imagis al ni, ke tiu konkurso vekos tian intereson.

Ne nur unuopuloj meditis pri la problemo, sed ankaŭ kelkaj kluboj kolektive studis ĝin en studkunvenoj. El ĉiuj kontinentoj (29 landoj) venis centoj da proponoj pri solvoj. Multaj kovertoj enhavis ankaŭ personajn rimarkojn, ekz.: “Ĉi tiu problemo okupis min multe pli longe ol nur dum la festotagoj” aŭ “Neniam antaŭe mi studis la Plenan Vortaron tiel diligente kaj detale, kaj la konkurso, eĉ se mi ne gajnus premion, pliriĉigis mian scion pri nia lingvo—kaj tiel mi tamen gajnis!” Multaj samideanoj ankaŭ kaptis la okazon kunsendi al la iniciatinto de la konkurso, la Prezidanto de UEA, bondezirojn kaj salutojn, kiujn li kun danko kvitancas!

Ĝis la lasta momento estis streĉa batalo pri la lokoj sur la listo de venkintoj. Bedaŭrinde du aŭ tri solvoj kun altaj poentciferoj ne plenumis la kondiĉon, ke ĉiu vorto devas esti trovebla en Plena Vortaro. Du personoj atingis la grandioze

altan sumon de 423 poentoj. Ili ambaŭ havis la jenan solvon:

PORDHOKO
KOREGONO
KONCERTO
KOREGONO
KROMNOMO
NOMBRONO
OFERDONO
GONOKOKO

Jen la listo de la gajnintoj:

- 1-a premio (laŭ lotumado): S-ro Vittorio Marccone, Varazze (Ital.) =423 p.
- 2-a premio (laŭ lotumado): S-ro Emilio Miralles, Valencia (Hisp.) =423 p.
- 3-a premio: S-ro Brisbane Eldon, Southport (Angl.)=421 p.
- 4-a premio (laŭ lotumado): S-ino Anna-Greta Strönne, Malmö (Sved.) =419 p.
- 5-a premio (laŭ lotumado): S-ro H. V. George, Torpoint, Cornwall (Angl.)=419 p.

Ĉar la konkurso estis sukcesa, la Prezidanto promesis prezenti novan problemon post kelka tempo.

La Konkursa Komitato

Cetera agado de NEL

Ofte ne-esperantistoj demandas nin kial ni ne anoncas, reklamas, propagandas en pli granda skalo. La respondo estas simpla: mankas la ekonomiaj rimedoj. Tamen ni provas en la plej racia maniero disponigi la sumetojn, kiuj estas je nia dispono. Ni ne povas pagi grandajn anoncojn, sed ni pretigis por la kluboj afiŝojn kaj broŝurojn. Ni utiligas konstante la eblecojn aranĝi prelegojn de eksterlandaj esperantistoj kaj intervjuigas ilin de lokaj gazetoj. Ni pretigis

ankaŭ 24-lecionan kurson por gazetoj, kaj por faciligi ĝian aperon ni faris matricojn el la kompostaĵo. Kaj ni verkis korespondan kurson, kiu mem estas mendebla ankaŭ de la plej granda korespondinstituto en Norvegujo.

*C. Støp-Bowitz,
Prez. de Norvega Esperanto Ligo*

Detala informo pri la administra sistemo de Norvega Ligo troviĝas en la ampleksa raporto de la “Konferenco pri la gvidado de la Esperanto-movado”. Tiu raporto estas mendebla ĉe Norvega Esperantista Ligo.

MESAĜO

por la legantoj de la revuo "Esperanto",
de D-ro M. G. Candau, Ĝenerala Direktoro
de la Organizo Monda de Saneco

Kreita antaŭ ses jaroj, la Organizaĵo Monda de Saneco laboras hodiaŭ en 117 landoj, alportante sian helpon al la Sanecaj Administracioj, kiuj ĉie gvidas dufrontan militadon: lukto *kontraŭ* la malsanoj infektaj kiuj cedas pozicion antaŭ la arsenalo moderna de l'kuracisto kaj de l'higienisto kaj lukto *por* la starigo de klopodadoj pozitivaj de higieno kaj de singardo kiuj priservas la sanecon, ĝin plifortigas kaj kapabligas la individuon rezisti la atakojn de la malsano kiam ĝi anonciĝas.

Se la lukto *kontraŭ la malsano* estas ofte signita de venk-informoj en temp-interspaco sufiĉe mallonga (en malpli ol dek jaroj Greklando kaj Italujo seniĝis de la malario, la pesto retroiras en Azio, la mortado tuberkuloza malaltiĝis je 50% en preskaŭ ĉiuj landoj okcidentaj), la lukto *por la sano* estas malpli rapida, pli malfacila kaj ĉefe malpli videbla. Ĝi havas kiel agadkampon la higienajn

konsultojn por la patrinoj kaj la infanoj kaj en la lernejoj kie oni formas la sanecajn inĝenierojn ŝargotajn de la sanigo. La lukto por la sano estas ankaŭ la mensa higieno, la higieno de loĝado kaj de la nutrado. Kaj ĝi estas eble antaŭ ĉio la saneca edukado de la publiko, la edukado de ĉiu individuo por la sano je kiu li rajtas, sed kiun li havas ankaŭ la devon antaŭgardi, por si mem kaj por la aliaj. Tiel, ĉiu inter ni partoprenas je la lukto por la sano, kiu laŭ tutmonda skalo estas kondukata de la OMS (Organizaĵo Monda de Saneco).

Ĝi estas verko de solidareco humana je kio ĉiuj povas kaj devas partopreni. Mi scias ke ĝi trovos eĉon inter la legantoj de tiu ĉi revuo kiuj komune posedas trans la landlimoj lingvon universalan, kaj kiel celon la union en la paco kaj en la interkompreno. Ili ne restos indiferentaj je tio kion proklamas la konstitucio de la OMS: "La sano de ĉiuj popoloj estas fundamenta kondiĉo por la paco de l'mondo kaj por la sekureco."

(Trad. : François Hayotte)



La ĉambrego de la Londona Esperanto-Klubo estis plenplena, kiam la 28an de Januaro D-ro Lapenna verve priskribis la historion de nia afero ĉe Unesko. La finan dramon en Montevideo li aktualigis por la ĉeestantaro per la helpo de lumbildoj kaj eĉ pli per magnetofona reprodukto de la kulmina akto, kiam la Pleno akceptis la nun faman rezolucion. Oni povis travivi kun D-ro Lapenna la nervostreĉan momenton, kiam la brita delegito staris por protesti kontraŭ sendiskutan akcepton. D-ro Lapenna parolis dum pli ol du horoj—sian prelegon li faris sen notoj tamen tute konsekvence kaj senhezite. Tiun majstraĵon ĉiu ĉeestanto longe memoros.

Petr Bezruč

Papilio

Kiel alaŭdo zefiro sin levis
super piceoj, larikoj, abioj.
En flu' de l' tempoj pasintaj mi revis.
Jen sur la man'—papilio !

Ĉu am', ĉu feliĉo vi estas, belulo ?
Flugu! Knabinon kaj knabon ornamu
sur nigraj haroj, sur mana veluro . . .
Kion *mi* kun vi, *mi* kun vi planu ?

El la ĉeĥa : Rudolf Hromada

ORGANIZAĴO MONDA DE SANECO

Ĝia celo, ĝia agado, ĝia strukturo

CELO

LA Organizaĵo Monda de Saneco, unu el la plej gravaj specialigitaj institucioj de la Unuiĝintaj Nacioj, celas, laŭ vortoj de sia konstitucio, “konduki ĉiujn popolojn al plejebla alta nivelo de sano”.

Ĝi ekzistas kiel konstanta organismo ekde la 1-a de septembro 1948 kaj enkalkulas hodiaŭ 84 membro-ŝtatojn.

O.M.S., unu el kies celadoj ambiciaj estas reprezenti la tutan homaron, estas preta akcepti ĉiujn ŝtatojn sendistinge. Tamen ne necesas nepre, ke la lando estu membro de O.M.S. por profiti je ĝia helpo, ĉar la Organizaĵo Monda de Saneco deziras alporti sian kunhelpon kie ajn montriĝas bezono.

Sed ĝuste kion signifas la vorto “Sano”?

Preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo konsentas kiel kredinde pruvas la konstitucio de O.M.S., ke tiu vorto signifas:

La Sano. “... stato de *kompleta fizika, mensa kaj socia bonfarto*” kaj ne nur “foresto de malsano aŭ invalideco”.

La konstitucio precizigas ankaŭ ke la sano, tiel difinita, estas

Rajto. “... unu el la fundamentaj rajtoj de ĉiu homo, kiel estas ties raso, religio, politikaj opinioj, situacio ekonomia aŭ socia”.

La konstitucio konstatas fine pri

Devo. “... la sano de ĈIUJ popoloj estas fundamenta kondiĉo de *MONDA PACO* kaj de *SEKURECO*” kaj ke “ĝi dependas de plej

intima kunlaborado inter la individuoj kaj la ŝtatoj”.

En 1946 estis adoptita la konstitucio de O.M.S., sed necesis atendi la ratifon de 26 membro-ŝtatoj de la Unuiĝintaj Nacioj por ke la Provizora Komisiono, starigita por ekfunkciigi la laborojn, povu cedi lokon al daŭra institucio.

La 7-an de Aprilo 1948, post ratifo de sia konstitucio, O.M.S. povis laŭlege fariĝi konstanta institucio. Post tri jaroj la nombro de la ŝtatoj subskribintaj ĝian konstitucion triobligis.

Ĉiujare la tuta mondo festas, je la 7-a de Aprilo, la Mondan Tagon de Sano, kiu permesas starigi bilancon pri la penadoj de la homo en la lukto kontraŭ malsano kaj konfirmi la promeson alporti al la popoloj sanon kaj bonfarton.

AGADO

Konsultaj Servoj kaj Teknikaj Servoj
Ilia Rolo

Du trionoj de la homaro vivas en regionoj “ne sufiĉe evoluigitaj”. La jara meza rento po persono atingas nur la dekonon de la enspezo en pli evoluintaj landoj. La meza aĝo de la enloĝantoj tie estas nur 30 jaroj, kontraŭ 63 en la pli favoraj landoj.

Tiaj ciferoj montras kiom sano kaj prospero estas solidaraj. O.M.S. celas helpon al la registaroj por rompi la magian rondon: malsano—mizero—malsano.

Se la malbona sano ankoraŭ hodiaŭ estas la sorto de plej granda parto de la homaro, tio dependas de du kaŭzoj: unuflanke, la nepre necesaj scioj por efika lukto kontraŭ malsano montriĝas

ne sufiĉaj ; aliflanke, la akiritaj scioj ne povas esti plene kaj profite eluzataj, pro manko de personaro kapabla kaj sufiĉe multnombra.

O.M.S. estas preta respondi al alvokoj el ĉiuj landoj kiuj bezonas praktikan helpon por solvi problemojn pri saneco.

Pere de siaj *konsultaj servoj*, O.M.S. disponigas al ili ekspertojn-konsilistojn kaj demonstraciajn stabojn konsistantajn el fakuloj nepre kompetentaj. La prisaj naciaj instancoj aligas al ili surlokajn personarojn, kies membroj tiel havas okazon konatiĝi kun modernaj kuracmetodoj kaj fariĝi siavice kapablaj higienistoj. O.M.S. tiamaniere certigas ke la laboroj entreprenitaj de ĝiaj fakuloj estos efike daŭrigataj post ilia foriro.

Alia interesa konstato: la demonstracioj organizataj de O.M.S. ofte instigas al konkuremo.

Por citi nur unu ekzemplan, la kontraŭmalariaj kampanjoj entreprenitaj de O.M.S. en unu jaro, ebligis protekti kontraŭ malario milionon kaj duonon da homoj. Sed pli rimarkinde ankoraŭ la ĝeneraligita uzado de la metodoj enkondukitaj de O.M.S. ebligis protekti pli ol 50 milionojn da personoj kontraŭ la ĉi-supra malsano.

Alivorte la rekta agado entreprenita de O.M.S. per internacia administrado instigis la landojn mem daŭrigi, siavice, novajn sanigajn kampanjojn kies rezultatoj pruviĝas tridekoble pli gravaj ol tiuj unuafoje havigitaj de O.M.S. Kaj nun jam pluraj landoj antaŭvidas organizi— aŭ jam ekfunkciigis—kontraŭmalariajn kampanjojn, kiuj celas liberigi de ĉi tiu malsano 450 milionojn da homoj.

KREI KVALIFIKITAN PERSONARON

La agado de O.M.S. kontraŭ tri gravaj plagoj t.e. malario, veneraj malsanoj kaj tuberkulozo, ja ne estas bagatela. La D.D.T., penicilino kaj B.C.G. (kontraŭ-tuberkuloza vakcino de Calmette kaj Guérin) pravigas, laŭ la opinio de multaj scienculoj, la esperon venki ĉi tiujn malsanojn en pli malpli baldaŭa estonteco.

O.M.S., tamen, ne opinias ke la farmaciaj substancoj solaj kapablas estri la malsanon. Tial, sendante siajn konsilistojn, ĝi ne limigas sian helpon al la registaroj por krei aŭ pligrandigi la sanigajn servojn: ĝi multobligas senĉese la agadojn kiuj faciligas pliampleksiĝon de la kompetenta personaro saniga.

Ke tia agado estas nepre necesa oni konvinkiĝos facile se oni pensas ke sur la kampo de sanigado (alkonduko de trinkebla akvo, provizumado je sanaj nutraĵoj, lukto kontraŭ insektoj, higiena forportado de la kloakaj akvoj) oni kalkulas hodiaŭ en la tuta mondo nur 12,000 kvalifikitajn inĝenierojn pri sanigado. En kelkaj regionoj de la terglobo oni kalkulas nur po unu kuracisto por 100,000 enloĝantoj kaj eĉ malpli da flegistinoj.

O.M.S. klopodas plibonigi tian situacion iniciatante vastan edukan kampanjon. Menciinde estas ke ĝi favordonas al kuracistoj, al flegistinoj kaj al aliaj membroj de saneca personaro individuajn stipendiojn kiuj ebligas entrepreni specialajn studojn kaj esploradojn; ĝi helpas kuracajn instituciojn, organizas diskutojn kaj konferencojn, kunvokas studrondojn.

INSTRUI HIGIENON

La agado de O.M.S., pli ol batalo *kontraŭ malsano*, estas lukto senĉesa

por la sano. Oni do komprenas ke O.M.S. konsideras tiom grava la prisanecan klerigadon de la publiko, sen kiu la sciencaj akiraĵoj ne povas kontribui al plibonigo de la sano.

En la kadro de siaj agadoj kreantaj fizikan, mensan kaj socian bonstaton, O.M.S. instigas programojn kiuj celas plibonigon de la higienaj kondiĉoj en kiuj vivas la homo, ĝi klopodas plibonigi la nutran dieton kaj zorgas plej atente pri patrino kaj infano sano. Ĝi kunhelpas al multobligado de la flegado, stimulas la disvolviĝon de mensa higieno kaj partoprenas en diversaj agadoj ligitaj kun la profesia higieno kaj kun la kuraca readaptado de homoj fizike aŭ mense malfortiĝintaj.

O.M.S. partoprenas ankaŭ aktive en la pligrandigita Programo de Teknika Helpo de la Unuiĝintaj Nacioj por ekonomia evoluigo de postrestaj landoj. En ĉi tiu afero, same kiel en la kadro de sia ordinara programo, O.M.S. kunlaboras intime kun la aliaj specialigitaj institucioj de la Unuiĝintaj Nacioj.

Por multaj kampanjoj instigitaj de O.M.S. la U.N.I.C.E.F. (Fondaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj por Infanoj) disponigas fincan kaj materialan helpon. O.M.S. kunlaboras ankaŭ kun aliaj specialigitaj institucioj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj precipe kun la Organizaĵo por la Agrikulturo kaj Nutrado (F.A.O.), la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj por Eduko, Scienco kaj Kulturo (U.N.E.S.C.O.), kaj la Internacia Organizaĵo de Laboro (I.L.O.).

PROTEKTADI LA SANON

Dum flegistinoj kaj kuracistoj deĵoras ĉie kie oni petas pri ili, la teknikaj servoj de O.M.S. daŭrigas

sian senĉesan agadon de kiu profitas ĉiuj landoj, ĉu ili estas membroj aŭ ne de la organizaĵo.

Ĉi tiuj servoj precipe laboras por kolekti informojn. Ilia tasko estas ankaŭ kontroli la aplikadon de la internaciaj regularoj akceptitaj de la Monda Asembleo de Sano.

En mondo kie la komunikiloj ebligas al la homo—kaj al la malsano—tiel rapidan transiron de la landlimoj, internacia organizado pri “avertoj” kaj serio de sanitaraj regularoj akceptitaj de ĉiuj landoj estas nepre necesaj.

La unua el tiuj servoj, jam antaŭe kreita de la Ligo de Nacioj, nekredeble evoluis je la impulso de O.M.S. La dua, sub la formo de sistemo de internacia protektado kontraŭ malsano, kiu prezentas maksimumon da sekureco kun minimumo da ĝeno por la turisma kaj vara trafikoj, estas akceptita, sub la formo de Regularo, de la kvara Monda Asembleo de Sano en 1951. Ĝi ekfunkciis al 1-an de Oktobro 1952.

La internacia sistemo de “Avertoj” konsistas el ĉiutaga servo pri radio-senditaj sciigoj tra tutmonda ĉeno de sendaparatoj. Aperoj de pesto, ĥolero, variolo kaj aliaj epidemioj, en ĉiuj parto de la terglobo, estas tuj signalata al la Organizaĵo. Faktoj kaj ciferoj pri la amplekso de la naskejoj de la epidemioj kaj iliaj ekzaktaj situoj dissendiĝas senprokraste per radio. Tiel ŝipoj sur la maro kaj aeroplanoj estas avertataj ĝustatempe kaj povas tuj decidi pri necesaj aranĝoj por kontraŭstari danĝeron kaj eviti ĝin.

LA UNUA INTERNACIA FARMAKOPEO

Ĉiu scias kiom grave estas ke en ĉiu lando la farmaciaj produktoj enhavu

identan koncentriĝon. La malsanulo al kiu oni ensorbigas dozon de penicilino, aŭ la infano kiun oni vakcinas kontraŭ difterio, sentas sian sekurecon plicertigita, ĉar tiuj medikamentoj estas mezuritaj laŭ *internaciaj* unuoj.

Ĉi tiuj normoj kiuj regas jam 50 preparaĵojn estas fiksitaj ĉu de O.M.S. ĉu de ĝiaj antaŭuloj. Ilia nombro atingos baldaŭ 88.

Sed la neceso normigi la farmaciajn produktojn prezentiĝas en okazoj malpli gravaj. Ni supozu ke svisa infano vundiĝas; oni tuj ŝmiras la vundon per joda tinkturo, kiu ne tro timigos lin. Sed se usona infano en Novjorko estos en sama cirkonstanco, tre eblas ke li kriegos ĉar en Usono tia medikamento ne havas la samgradan koncentriĝon kiel en Svislando. Tiaj diferencoj, kiuj koncentras centojn da preparaĵoj, okazigas gravan ĝenon al vojaĝantoj, pliajn kostojn al la fabrikantoj, kaj prezentas seriozajn problemojn al la scienculoj kiuj penas taksu la rezultojn de siaj esploradoj.

Tial O.M.S. decidis unue starigi internacian Farmakopeon, verkon kie troviĝas formuloj kiuj ebligas doni, en ĉiuj landoj, la saman intenson al la medikamentoj. Du eldonoj de tiu nova farmakopeo aperis post 1951, angle, france kaj hispane. Ĝi aperas ankaŭ germane.

La kuraca progreso renkontis alian obstaklon, Bedaŭrinde ja estas, ke la statistikoj pri malsanoj kaj kaŭzoj de mortoj ne estas starigitaj sammaniere en la diversaj landoj. La Asembleo de Sano, por plibonigi tian situacion, akceptis internacian regularon de la prisanecaj statistikoj. Ĉi tiu estas konstante reviziata por malpliigi la barojn kiuj malfaciligas la liberan disvastiĝon de prisaneca informaĵo.

O.M.S. partoprenas en la kuracaj esploradoj kunlaborante intime kun la naciaj institucioj, pere de konsultaj grupoj kaj de komitatoj de ekspertoj, kaj donas sian helpon sub la formo de kredito aŭ sendante spertulojn al la laboratorioj kiuj okupiĝas pri esploradoj de internacia graveco.

Ĉi tiuj laboroj koncernas parazitajn malsanojn ekzemple filariozo kaj bilharziozo, kaj virusojn ekzemple gripo, poliomjelito kaj trahomo.

La Oficejo de Esploradoj pri Tuberkulozo, en Kopenhago, kreita de O.M.S., kun helpo de la dana Registaro, entreprenis esploradojn kiuj koncernas la uzadon kaj perfektigadon de la vakcino B.C.G. O.M.S., aliflanke, grave taksas la esploradojn faritajn pri la diversaj uzadoj de antibiotikoj kaj pri la brucelozo, malsano infektanta la homon kaj kiu kaŭzas difektegojn ĉe la bestaro.

Siaflanke la biblioteko de O.M.S. kiu posedas riĉan kolekton de verkoj pri medicino kaj ricevas plurmilojn da medicinaj periodaĵoj el ĉiuj landoj, prezentas valoran fonton de dokumentado por la prisanecaj specialistoj de la tuta mondo. Ĝi alportis sian helpon al pluraj landoj kiuj deziris krei medicinajn bibliotekojn kaj al tiuj kies kolektoj, rabbitaj aŭ detruitaj dum la milito bezonis urĝan restarigon.

Ankaŭ menciindaj estas la publikaĵoj de O.M.S., kvindeko da teknikaj kaj sciencaj verkoj, ekzemple la Bulteno de O.M.S., la Kolekto Internacia de Prisana Leĝaro, la Kroniko de la Organizaĵo Monda de Sano, la Ĉiusemajna Bulteno Epidemiologia kaj Demografia, la Raporto Epidemiologia kaj Demografia (ĉiunmonata) kaj diversaj teknikaj raportoj kaj apartaj studoj pri fiksitaj temoj.

STRUKTURO

Ĉiujare la *Asembleo Monda de Sano* kunvenigas la delegitojn de la membro-ŝtatoj de O.M.S. por fiksi, en la ĉefaj linioj, la politikon de la Organizaĵo, por decidi pri ĝiaj programoj kaj buĝeto kaj por akcepti la necesajn prisanecajn regularojn internaciajn.

La Asembleo elektas dekok landojn el kiuj ĉiu rajtas elekti membron kiu sidos ĉe la *Plenumkomitato*.

La Plenumkomitato kunsidas dufoje ĉiujare por efektivigi la decidojn kaj sugestojn de la Asembleo por prepari la tagordon de ĝiaj kunsidoj, por plenumi ĝiajn ordonajn kaj por decidi urgajn rimedojn.

La kurantan laboron de la organizaĵo faras la sekretario kiu konsistas el la teknika kaj administra personaro de la organizaĵo kiun estras D-ro M. G. Candaŭ (Brazilo), la Ĝenerala Sekretario.

La organizaĵo estas regule informata pri la diversaj aspektoj teknikaj de sia programo, pere de la


grupoj de ekspertoj komisiitaj por orienti plej bone ĝian agadon laŭ la plej lastaj eltrovoj. Ĉi tiuj grupoj, konsistantaj el plej kapablaj specialistoj de la medicina mondo, sin dediĉas al ĉiuj kampoj de la prisana agado.

La tasko de O.M.S. estas kunhelpi, konsili kaj kunordigi, sed ne agi kiel supernacia estraro prisaneca. Tial ĝi agis ekde la origino laŭ la principo de regionismo. Ses regionaj organizaĵoj estas kreitaj kiuj reprezentas tiom da geografiaj regionoj :

<i>Regionoj</i>	<i>Regionaj Oficejoj</i>
Sudorienta Azio	New Delhi
Orienta Mediteraneo	Alexandria
Amerikoj (Tutamerika Sanitara Oficejo)	Washington
Okcidenta Pacifiko	Manila
Afriko	Brazzaville
Eŭropo	Genève (translokiĝos en aŭtuno 1955 al Kopenhavn)

Tradukis Paul Bouvier.

Recenzoj, diversaj artikoloj, noveloj ktp, ĉiuj jam kompostitaj, transfluis la nunan kajeron. Beninda estas tiu riĉo ! Ĉio aperos kiel eble plej baldaŭ.
Red.



PLENE RIMITA LAŬ LA ORIGINALO


IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., aŭfranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



Nekrologo



Jean Delor

Delor, Jean, profesoro en Sisteron, antaŭe en Gaillard-Annemasse Francujo, subite forpasis 3an de Feb. pro korafekcio. Profunde emociita liaj amikoj multnombraj sciigas pri tiu ĉi informo. J.D., sperta lingvisto, instruanta la latinan kaj grekan, konante la araban kaj persan lingvojn, pasie amis Esperanton kaj estis plezuro por la ĝenevaj

Esperantistoj diskuti kun li pri lingvaj problemoj, dum la kunvenoj de la Sabata Rondo. Vivinte en apudĝeneva Annemasse, Profesoro Delor sukcesis starigi grupon de fervoraj Esperantistoj, regulaj gastoj de la E-grupo LA STELO en Ĝenevo. Premiito de la Belarta konkurso en Haarlem lia prozaĵo originala aperis en la nunjara januara numero. Jean Delor tradukis dum pasintaj jaroj, la faman romanon de A. Daudet: Tartarin en Tarascon, verŝajne aperonta kiel libro.

Nepovinte toleri la nebulan klimaton de Annemasse nia amiko estis vokita al la kolegio de Sisteron en suda departemento franca. La senkompata sorto ne volis ke li retrovu sanon kaj forton tie. La enterigo okazis sabate 5an de Februaro, kaj ĝin partoprenis samideanoj el Genève, Annemasse kaj Sisteron.

Al lia edzino (de norvega deveno) ni esprimas nian sinceran kunsenton.

H.J.

En pasinta numero de nia revuo ni anoncis la subitan morton de **D-ro Karl Dworschak**, ĝenerala direktoro de la Aŭstria Poŝt- kaj Telegrafadministracio. Pulmo-malsano postulis operacion, kiu pro forta antaŭeniro de la malsano ne povis savi lin. Li forpasis la 3an de Februaro.

La mortinto naskiĝis 24/10/03 en Krakovo, filo de aŭstra oficiro, studis en Vieno kie li doktoriĝis. Enoficiĝis en la poŝta servo. Kiel necedema civitano de sendependa

patrolando, li estis maldungita de la nazi-socialisma reĝimo kaj arestita. Post liberigo li laboris en privata entrepreno. En 1945 komisiita restarigi la ĝeneralan poŝtan direkcion kies estro li fariĝis.

Altkreska eleganta viro, dotita de la proverbe konata ĝentileco viena, tiel oni konis kaj ŝatis lin. Liajn meritojn por la refunkciigo de la poŝta servo post la bankroto de la nazi-socialisma regado, oni dankesprimis per alta ordeno.

Kun la poŝta personaro, kun la viena popolo funebras ankaŭ la Esperantistoj. Jam en studjaroj li okupiĝis pri Esperanto kaj ne forgesis ĝin kiam li altiĝis kaj fariĝis homo kun povo decidanta. Tio ĉi esprimiĝis per la uzado de nia lingvo en la poŝta servo, faktoj al ĉiuj konataj. Estas dank' al samideano Rudolf Michael Frey, ke D-ro Dworschak praktike interesiĝis por nia lingvo kaj lia alta rango helpis multilate al la Aŭstria Esperantistaro. Vidante antaŭ ni la du belajn poŝtmarkojn je honoro de nia lingvo, ni memoru la iniciatinton kaj realiginton. La Komitato/Estraro de UEA rekonis la gravajn servojn faritajn kaj dum la kongreso en Haarlem estis akceptita la propono nomi D-ron Dworschak, Honora Membro de UEA. La funebra ceremonio okazis en la Karlskirche en Vieno. Florkrono estis deponita en la nomo de la tutmonda kaj enlanda E-organizaĵo.

Al lia familio la reprezentantoj de UEA esprimis la kondolencon de la dankema Asocio.

R. Cech/H.J.

Kalda Johannes, fervora samideano en Hälsingborg, Svedlando, dumviva membro de UEA, forpasis 15/II/55, en sia 71-a jaraĝo. Naskiĝis en Estonio, lernis Esperanton en 1906, dum longaj jaroj Delegito de UEA en Haapsalu (sub nomo Johannes Grünthal). Rifugiĝis 1944 Svedlandon kie li trovis amikojn el la granda tutmonda familio esperantista. Tutkora kondolenco al la parencoj kaj sinceran dankon por ĉio kion li faris fervore en nia loka grupo.

A. Lundgren.

Ryser. F. Ryser, membro de 1938, el Solothurn, Svislando.

Vinzent. Andrew S. Vinzent, dumviva membro de UEA el Oakland, Kalifornio.

Eksterordinara Okazaĵo en Nederlando: 'E 55'

PERMESU al ni, ke ni pentru al vi bildon pri Nederlando . . .

La 9-a de Majo 1940 : Flor-kampoj kaj fruktarbejoj en sia plej ornama festa vesto sub blua ĉielo kaj dolĉa printempa sunbrilo. La Nederlanda popolo, bicikle admiranta sian ĝardensimilan landon, parolanta pri vetero kaj cetero, sentanta la militon inter apudaj ŝtatoj ĉefe pro mobilizo de l'armeo, neniel serioze kredanta en propra enmiksiĝo. Bonfarta lando kun normalaj trafiko, komerco, industrio, ne travivinta militon dum pli ol cent jaroj.

La 10-a de Majo 1940 : Tondraj sonoj de bomboj kaj kanonoj, amasegoj da fremdaj soldatoj ĵetitaj el la sama blua ĉielo, sango sur ĉiu vojo, teruro en ĉies koro. Heroa rezistemo vekiĝinta en la tuta popolo.

La 14-a de Majo 1940 : duhora perbomba "forviŝado" de la tuta urba centro de Rotterdam, miloj da pereintoj, la urbo komplete paralizita. Ultimato : kapitulaco aŭ sama sorto por ĉiuj aliaj grandaj urboj.

La 18-a de Majo 1940 : La urba arkitekto de Rotterdam estas komisiita de la urbestro, fari projekton pri nova urbocentro, por ke tuj post finiĝo de la milito la rekonstruo povu komenciĝi. Jen, fakto karakteriza por la spirito de Rotterdam kaj de la tuta popolo : dum brulas kaj fumas ankoraŭ la ruinoj, dum funebras la tuta urbo, dum sangas la koro pro perditaj vivoj kaj valoroj, tamen tuj direkti la okulon al la estonteco. Poste, pro tiu energia ago, la tago de la 18-a de Majo fariĝis la Tago de la Rekonstruo, festata ĉiujare en la tuta lando per inaŭguroj de gravaj

rekonstruitaj objektoj. Sed, en la momento de tiu karakteriza ago, kiu povus supozi, ke devos pasi kvin mallumaj jaroj de teroro kaj mankegoj . . . ?

La 5-a de Majo 1945 : la uzurpulo retiriĝas, detruinte malantaŭ si ĉion vitalan kaj utilan. La lando rericevas sian liberecon. Sed regas ĝin komplete ĥaoso materia kaj morala. Jen la momento, tiel arde atendita. Jen la momento, kiam devus komenciĝi la rekonstruo. Sed mankas ĉio, per kio oni devus tion komenci : ordo, homoj, materialoj, mono . . .

Tamen, popolo, dum jarcentoj persiste luktinta kontraŭ furiozaj naturfortoj, ne longe restas paralizita pro militaj detruoj. Pene kaj malrapide, sed ĉiam pli energie, la ordo estis restarigita, trafiko, komerco, industrio rekonstruitaj. Per ekstrema streĉo de ĉies fortoj la popolo atingis en dek jaroj nivelon bonfartan, pli altan ol en 1939.

Kiel tio povis okazi kaj kiaj estas la rezultoj, tion Nederlando montros al la tuta mondo, de Majo ĝis Septembro 1955, per grandega nacia ekspozicio en Rotterdam : "E 55", kio signifas : La Energio de la Nederlanda popolo en 1955. Karakterizos tiun ekspozicion originaleco, dinamikeco kaj simboliko. Vane oni serĉos tie sekajn statistikojn aŭ longajn subskribojn. Ĉio kaj ĉiu en la ekspozicio funkcios, moviĝos, laboros kaj tiel plej elokvente rakontos la historion de tiu ĉi mirakla dekjara evoluo kaj montros la rezultojn atingitajn. Kun granda fantazio, la plej famaj artistoj, pentristoj, skulptistoj, arkitektoj kaj inĝenieroj nun

ellaboras la plej aŭdacajn planojn. La ekspozicio okazos sur ampleksa tereno en halegoj, en aro da pavilonoj kaj en la libera naturo en parko. Funkcios tie fabrikoj, laboratorioj kaj eĉ ŝipkonstruejoj, sed troviĝos ankaŭ modelaj bienoj, florkulturejoj kaj sportejoj. Kaj kredis, ke en nacia ekspozicio de tia akvolando ne mankos la akvo! Ĝin oni renkontos ĉie. Krei maron en ekspoziciejo estas bagatelo por Nederlandaj akvokonstruaj inĝenieroj. En unu halego ĝi ĉirkaŭos konstruatan ŝipon je realaj mezuroj. En granda baseno ĝiaj ondoj lulados la kompletan nederlandan komercan ŝiparon je skalo 1 : 200. En fabele, subakve, lumigita naĝejo ĝi estos ĉiutaga ludejo por la Roterdama lernantaro. La akvoprovenco Zeeland, scenejo de la februara katastrofo 1953, dua liveranto de ostroj en la tuta mondo, ne nur kondukos la publikon en sia pavilono ĝis antaŭ la maro, sed ankaŭ igos ĝin flari la salecan marodoron...! Kiel, tio estas sekreto de inĝenieroj kaj artistoj.

Ne nur Zeeland, sed ĉiuj provincoj estos reprezentataj en "E 55" en apartaj pavilonoj kiuj grupiĝos ĉirkaŭ la "Placo de l' dekunu Provincoj." Ili ĉiuj montros siajn specialaĵojn kaj precipe ankaŭ sian folkloron. Sur tiu placo regule okazos folkloraj demonstracioj.

nur larĝigi sian scion, sed ankaŭ ĝui

Neeble, citi ĉion alian montrotan en "E 55". Oni konatiĝos ne nur kun ĉiuj detaloj de la ekonomio, komerco kaj industrio, de l' akvoproblemo kaj agrikulturo, sed oni ricevos ankaŭ ampleksan bildon pri la instruado, edukado, kulturo, popola sano, loĝado, familia vivo kaj turismo. Kaj, krom ĉio alia, ĉar oni atendas centmilojn da vizitontoj, kiuj ferios kaj deziros ne

kaj bone amuziĝi, oni aranĝas ampleksan terenon en la plej bela urba parko kun ĉiospekaj artaj, kabaretaj, sportaj kaj aliaj allogaĵoj kaj amuzaĵoj, kiuj povos kontentigi altpostulan internacian publikon.

En 1955, La Tago de la Rekonstruo havos tute apartan karakteron, ĉar tiam oni inaŭguros en plej solena, sed ankaŭ en originala maniero, ĉi tiun nacian ekspozicion "E 55", kiu daŭros ĝis Septembro. En unu el la programeroj de tiu solenaĵo havos parton ne nur la plenkreskuloj, sed ankaŭ la "Liberiĝa Junularo", nome la dekjara infanaro de la lando. Por reprezenti ĝin, estas elektitaj dekunu knabinoj kaj dekunu knaboj—el ĉiu provinco po unu paro—ĉiuj naskiĝintaj la 5-an de Majo 1945. La knabinoj hisos la flagojn de siaj provincoj sur la Placo de l'Dekunu Provincoj, la knaboj liberigos poŝtkolombojn forflugontajn al la provincaj ĉefurboj kun mesaĝo pri la inaŭguro. Ankoraŭ multmaniere ĉi tiu Liberigita Junularo ludos rolon dum la ekspozicio.

Kaj kial Rotterdam, kial oni elektis ĝuste Rotterdam por tiu ĉi grandioza okazaĵo? Ĉar ĝi estas la urbo, la plej trafita de la milito, kie do la rekonstruo plej elokvente parolas per modernega nova urbocentro—bedaŭrinde ankoraŭ ne tute finkonstruita; ĉar ĝi, Reĝino de l'Mass, per sia belega rivero, aorto de l'urbo, montras la korobaton de la lando; ĉar ĝi, per sia dinamikeco plej trafe simboligas la energion de la popolo; ĉar ĝi ŝatas originalajn, grandiozajn kaj aŭdacajn entreprenojn, ĝi, kiu posedas la plej grandan konstruaĵon de Eŭropo (Pograndkomercejo), kiu posedas la ununuran konstantan konstruekspozicion en la mondo (Konstru-Centro), kiu ĵus komisiis al la fama rusdevena usona skulptisto Naum

Gabo, krei skulptaĵon, 25 metrojn altan kaj 10 metrojn larĝan, komision senprecedenca al iu ajn artisto kaj afero ne okazinta de la tempo de l'antikvaj egiptoj . . .

Estas tute logike, ke la Roterdamaj esperantistoj trovis la unikan ekspozicion kialo por ion organizi por la internacia esperantistaro, por ke ĝi des pli ĝuu la viziton al "E 55". Ili aranĝas specialan kulturan semajnon en Konferencejo apud la urbo. Tiu aranĝo kompletigos la impreson pri Nederlando, kiun ricevos la vizitantoj de "E 55", per prelegoj pri Nederlando, ekskursoj al famaj vidindaĵoj kaj ĉiuspecaj distraĵoj. Oni aŭdos prelegon pri la nederlanda pentroarto kaj poste vizitos kelkajn muzeojn. Oni aŭdos prelegon pri la nederlanda literaturo kaj poste aŭdos el ĝi kelkajn deklamaĵojn. Oni aŭdos prelegon pri la akvoproblemo kaj poste faros ekskurson al la akvokatastrofa regiono. Kaj, antaŭ ĉio, oni aŭdos prelegon pri "E 55" kaj plurfoje vizitos ĝin.

Multaj esperantistoj, kiuj ekkonis Nederlandon dum la Haarlem-a kongreso kaj vidis, kiel oni tie organizas aferojn, eble deziros pli bone ekkoni ĝin. Multaj aliaj, kiuj tute ankoraŭ ne vidis ĉi tiun landon de vastaj horizontoj, ventmueliloj kaj ĉarmaj pejzaĝoj, nun havos eksterordinare favoran okazon konatiĝi kun ĝi. En "E 55" oni renkontos kvazaŭ en koncentrita formo ĉi tiun malgrandan landon kaj popolon, kiu sukcesis meze inter grandaj potencoj resti si mem, konservi propran stilon per propraj rimedoj kaj tiel firmigis sian reputacion en la mondo.

Homoj, al kiuj plaĉas ekkoni fremdajn landojn kaj popolojn, vojaĝu ĉijare al Rotterdam por konatiĝi kun



Inĝ. J. G. Isbrucker, Prezidanto de la Akademio

Vi baptis **-end** ; do nin edifu :
 "Ne farenda"—kion signifas ?
 Ĉu ke ĝin fari *ne necesas*,
 aŭ fari oni *ne permesas* ?

En drinkejo. Ebriulo eniris drinkejon kaj senkonscie surpaŝis la voston de kato tie kuŝanta.

La besto kriis : "Ffffu" !

Surprizegita la ebriulo ekkriis :
 "Maloftaĵo ! En tiu ĉi drinkejo oni lokas sur la planko la sifonojn !"

popolo, kreinta kaj kreanta al si la propran teron kaj ĵus farinta miraklon el ĥaoso en nuraj dek jaroj.

M.H.V.

Vitala = vivgrava

Esperantista vivo en la lokaj grupoj

EN la kadro de la kulturaj aferoj UEA havas la rolon kolekti plej multajn spertojn, kunigi ilin kaj prezenti ilin al la samideanoj kiuj deziras plibonigi la esperantistan vivon.

Tiu grava temo, multfoje pritraktita, estos denove pristudata de tiuj el niaj samideanoj, kiujn konstante malgajigas la penso ke ili ne sukcesas interesigi daŭre siajn grupanojn, kredeble pro manko de taŭgaj allogaĵoj. Tiuj allogaĵoj povas varii laŭ la landoj; tamen oni povas trovi komunajn aranĝojn kaj ĉu ne estas normale por ni provi ĉiam pli internacian vivon, ne pensante ke nia propra vivmaniero estas la plej bona?

Ni provu klarigi la aferon! Ĉu ekzistas rimedoj propre esperantistaj kapablaj interesigi kaj pasiigi membrojn de la grupo? Jen la *unua demando* farebla! La tuta intereso de la internacia lingvo konsistas permesi al homoj apartenantaj al diversaj nacioj kompreni sin reciproke, troviĝi antaŭ novaj vivkutimoj, pensmanieroj, malkovrantaj mondon, pri kiu oni estis malbone, aŭ tute ne, informita.

Tio estas certe plena je intereso por intelektuloj, sed ekster la grandaj urboj, oni ne trovas ofte apud si esperantistajn fremdulojn venantajn rekte el sia patrujo, kaj kapablajn esprimi sian penson klare kaj kompreneble.

Oni estas do devigata plej ofte organizi la esperantistajn kunvenojn sen la fremduloj, kiujn oni bezonus.

Alia demando: Ĉu estas eble kunvenigi kun sukceso en ia salono, nur per esperantistaj rimedoj, personojn loĝantajn en sama urbo,

kaj veki ĉe ili daŭran intereson por la grupo? Tiujn personojn oni renkontas en la ĉiutaga vivo, kaj la fakto ke oni renkontas ilin en esperantista kunvenejo ne alportas realan novaĵon. En la kursoj, la intereso daŭras ĝis la fino de la kurso, se la profesoro konas sian metion. Sed en la grupaj kunvenoj, la intereso kuŝas ĉefe en la Esperanta interparolado.

Tio entute ne sufiĉas kaj restas nur, post kelkaj semajnoj, por altiri la grupanojn, la allogaĵoj, kiuj altiras kutime la homojn al interesaj ne-esperantistaj kunvenoj: tio estas ekzemple la kinematografo, la teatro, la muziko, la kantado, la dancado, la manĝado, la trinkado. Tion oni forgesas tro ofte. Se oni starigas en la grupoj programojn tiel interesajn kiel estas la programoj, kiujn oni ĉeestas kun plezuro de tempo al tempo en urbo, la samideanoj nedubeble venos multaj al la kunvenoj de niaj grupoj.

Oni tuj diros, ke la realigo de tiaj programoj necesigos elspezojn, kiujn la grupoj ne povas elporti. Ne, laŭ mi. Kompreneble, oni ne povos organizi verajn spektaklojn en esperantista kunvenejo, sed oni povos organizi interesajn kunsidojn dank' al aparatoj pruntitaj de sindonemaj grupanoj, aŭ aĉetitaj per la asocia kaso, aŭ luitaj de tempo al tempo, ekzemple.

Oni povos ankaŭ organizi kunvenojn, kun enirpago, en salono speciale aranĝita por spektakloj aŭ disaŭdigoj. Ni pristudos tiujn eblaĵojn en speciala posta artikolo. Tio, al kio ni volas antaŭ ĉio atentigi niajn legantojn estas la fakto, ke la grupanoj ĉeestos la grupkunvenojn, nur se tiuj

kunvenoj estos egale, aŭ pli interesaj ol tiuj, kiujn ili kutime ĉeestas en la urbo, kie situas la esperantista grupo.

La grupanoj ne ĉeestos ilin, se ili imagas al si, ke ili enuos. Sed ili ĉeestos certe, se ili esperas amuzi sin, unue per Esperanta interparolado, sed precipe per ĉiuj procedoj, kiujn ili konas kaj kutime ĝuas.

Estas nur necese elekti la procedojn plej malmultekostajn por la grupo, sed senhezite oni devas organizi, kaj ĝenerale postuli pagon, kiu kompensos la elspezon faritan.

Ni diru, ke ni ne plu estas en la epoko, kiam oni kontentiĝis, por niaj kunvenoj, je tute malgranda amuzo. En la nuna momento, por okupi la liberan tempon, aŭ oni laboras tre serioze, aŭ oni volas sin amuzi plene laŭ modernaj procedoj, ne farante ian ajn intelektan penadon. Oni konsentos al la lernado de Esperanto, se oni senpene povos ĝin alkroĉi al amuzado.

Aliflanke, estas tamen personoj kiuj ŝatas pligrandigi siajn konojn. Por ili, la klubkunvenoj povos alporti grandan intereson per instruaj prelegoj kaj interŝanĝoj de ideoj.

Ĝenerale parolante, iu, kiu komencas interesiĝi pri Esperanto, ne estas tute sen idealo. Se la klubkunvenoj estas sufiĉe valoraj, ni povas esperi favoran evoluon de la spiritoj.

Finfine ni ne forgesu ke nia Majstro diris ke li ne volas krei la lingvon nur por praktikaj servoj, sed por la interna ideo: la Homaranismo.

Ni malfermas la kronikon de la Esperantista vivo kaj en sekvantaj artikoloj ni parolos pri:

la plej bonaj metodoj por instrui la lingvon,

allogaj programoj,
eksteraj rilatoj,
konsiloj por la financoj,
ĝenerala informado al publiko.

Poste ni petos ke la plej bone organizitaj kluboj de la mondo verku raporton pri siaj aktivecoj, tiel ke estu bonaj ekzemploj por ĉiuj.

J.G.

Salutinde

La 3-an de Marto disaŭdigis Radio Tirol (Innsbruck) enkadre de la tagmezaj sciigoj, *la tutan tekston de la Unesko-rezolucio favore al Esperanto*. Radio Tirol estas do la unua sendstacio de Aŭstrujo (eble de tutmondo?) kiu elradiis tiun ĉi tiel gravan kaj ĝojigan sciigon. Oni signu tiun tre afablan geston per multnombraj dankskribaĵoj! Adreso: Radio Tirol, Nachrichtendienst, Innsbruck, Aŭstrujo.



La "Honora Donaco"

La reago de nia samideanaro al la alvoko de nia Vicprezidanto Kennedy antaŭ kelkaj monatoj estis tre kontentiga. Sekve de tio, la duan de decembro S-ro Kennedy povis transdoni al S-ro Goldsmith ĉekon kiu donis grandan plezuron ne nur al la oferema samideano kiu plene meritas tiun donacon, sed ankaŭ al ĉiuj kontribuintoj.

Ni povas diri ke la rezulto de la Honora Donaco sumiĝis je £300, kiu sumo reprezentas entuziasmajn donacojn de preskaŭ dumil samideanoj kaj kluboj.

S-ro Goldsmith jam sur paĝo 13 de la januara numero dankis al vi ĉiuj pro tiu bela donaco. Bedaŭrinde, pro la grandega nombro da donacintoj, estas neeble citi ĉiun unuopan donacon.

J.C.R.

KONGRESOJ KAJ FERIOJ

Konstanz, 23-29 Julio. En ĉi tiu belega ferio-urbo okazos la **Antaŭ-kongreso de la 40-a Universala Kongreso de Esperanto**. Ĝi situas en la plej sudokcidenta pinto de Germanujo apud Aŭstrujo kaj Svislando. Kultura programo enhavas i.a. paroladojn de eminentaj oratoroj, koncerton, festvesperon. Turisma parto konsistas el ekskursoj al Aŭstrujo kaj Svislando, piroteknikaĵoj, vizito al kasteloj, vinkeloj ktp. Cseh-metoda Esperanto-kurso perfektiga. Loĝado ĉefe ĉe privataj gastigantoj. Invitprogramo kaj urba prospekto kun Esperanta aldono pri Konstanz ĉe: IFS Esperanto, Konstanz, Grüngang 8, Germanujo.

La 8-a Kongreso de Argentina Esperanto-Ligo okazos en Rosario, 7-10 Aprilo, 1955. Salutu telegrame!

Gent'aj Floraloj (Florfest), 23 Aprilo-1 Majo. Flandra Ligo Esperantista, Sekcio Gent, invitas vizitontojn de la Floraloj al sia merkreda vespera kunveno dum tiu Semajno (27 Aprilo) en Café de Gand, 20-a horo, Graf van Vlaanderenplein, 10.

Landa kongreso de Esperanto en Francujo okazos en Arras (Pas de Calais), 28-29 de Majo kaj en Boulogne-sur-Mer la 30-an de Majo. La lasta tago estos dediĉita al la prifesto de la Unua Universala Kongreso, okazinta en Boulogne en 1905. Informon kontraŭ respondkupono de U.E.F., 34 rue de Chabrol, Paris X.

Nice, Franca Riviero, invitas vin okaze de la Esperantista Federacia Kongreso 7-8 Majo. Kora akcepto, belega lando, neforgeseblaj ekskursoj. Informoj ĉe Esperanto-klubo, Palais des Fêtes, 25 rue Rossini, Nice (A-M).

Berlino valoras vojaĝon!

Vizito al Berlino fariĝas pli simpla. Flugante, oni ne bezonas rusan transitvizon; cetere por vizitantoj el nordaj ŝtatoj la rusa transitvizo estas akirebla en mallonga tempo. Okcidenta Berlino disponigas al vizitantoj 6,000 gastlitojn, de la luksaj hoteloj ĝis solidaj pensionoj kaj komfortaj fremdulhejmoj. Pri la allogaĵoj kulturaj kaj

amuzaj de Berlino estas superflue paroli. Ĉiujn informojn donos Verkehrsamt Berlin, Faranenstr. 7-8, Berlin-Charlottenburg 2.

Nur 42 lokojn havas la komforta, moderna aŭtobuso por mirinda 23-taga vojaĝo tra **Italujo**, 18 Julio ĝis 9 Aŭgusto. Dum la Kongresa semajno oni baziĝos en Bologna por kongres-partopreno kaj specialaj ekskursoj. La cetera programo estas plej impona kaj vasta vojaĝo tra la plej ravaj urboj kaj regionoj de Italujo. Prezo relative tre favora: Nur por esperantistoj kaj ties familianoj. Detalojn donas S-ro Anĝelo Lovati, Via Lipari 8, Milano (629). Tio ĉi estas oficiala aranĝo de Internacia Esperanto-Turismo-Centro, Parizo.

Internacia Fervojista Kongreso, 8-13 Majo en Zurich. Programo alloga ankaŭ por nefervojistoj. Festparolado de D-ro Edmond Privat. Limdato por aliĝo 15-a de Aprilo. Informojn kaj aliĝilojn de O. Walder, Eigenheim, Romanshorn, Svislando.

Por grandioza Jubilea Rapsodio en Bologna. Pioniroj, artistoj ĉiuspecaj, i.a. grupoj de gekantistoj ĉeestontaj la U.K. en Bologna! Ĉu vi amatore partoprenu la grandiozan jubilean rapsodion vendrede 5.8.1955? Se jes, bonvolu tuj skribi pri viaj kapabloj (instrumento, voĉ-klasifo, referencoj, k.t.p.) kaj event. deziroj al la komisiita organizanto: S-ro Roland Dupuis, Eldona Societo Esperanto, Box 19071, STOCKHOLM, Svedujo.

Internacia renkonto antaŭ la Bolonja Kongreso okazos de la 23-a ĝis 29-a de Julio en **Ljubljana**, Jugoslavio. Vizito de montara, subtera kaj apudmara regionoj. Petu prospekton de Turisma sekcio de Slovena Esperanto-Ligo, Ljubljana, Miklošičeva 7, Jugoslavio.

Nobela kastelbieno en Münchenwiler, Svislando, kore invitas, tuj post Bolonjo (7-a-14-a Aŭgusto) esperantistojn "por ludo kaj studo" pri esperantismo kaj geonismo. Geonismo estas studo pri la homo, lia vivo kaj lia vivejo, la tero. Belan prospekton sendos Svisa Esperanto-Instituto, Hotel Metropole, Bern, Svislando.

Estas eble viziti Ĉeĥoslovakion! La ĉeĥoslovakaj aŭtoritatoj donos enirpermeson al difinita nombro da eksterlandanoj, kiuj vizitos Spartakiadon, la grandan gimnastan feston, kiu okazos de la 23-a de Junio ĝis la 6-a de Julio 1955 en Praha. Tiuj vizitontoj havos okazon vidi la pentrindajn regionojn de tiu lando, multnombrajn

historiajn memoraĵojn, kaj povos observi la grandajn progresojn faritajn. La ĉeĥoslovakaj esperantistoj deklaras sin pretaj akcepti kaj gastigi la eksterlandajn gastojn en mezuro de sia ebleco. Estas koncedataj fervojrabatoj kaj ekzistas diversaj faciligoj.

Ĉiu interesiganto sin turnu tuj—plej malfrue la 30-an de Aprilo—al ĉeĥoslovaka legacio de sia lando pri detaloj. Por oficialaj informoj skribu aŭ al via ĉeĥoslovaka amiko aŭ al prezidanto de E-klubo en Praha, S-ro Jaroslav Šustr, Dlouha 10, Praha I.

La gastameco de niaj bravaj ĉeĥoslovakaj samideanoj estas konata kiel nesuperebla. Ĉiu, kiu vizitos ilian landon kaj spertos ilian amikecon kaj ilian senperan, riĉan lingvouzon, havos travivaĵon neniam forgesotan.—Red.

La Foiro de Lille, 1955, festos sian 30-jaron de 23 Aprilo ĝis 8 Majo. Ĉiu strukturo, kiu suferis dum la dua mondmilito, estas rekonstruita. La Foiro okupos 20,000 m², el kiuj 80,000 estos kovritaj de haloj aŭ modernaj strukturoj adaptitaj al la specialaj Sekcioj. La 10,000 m² de la Granda Palaco ne sufiĉos por akcepti la Sekciojn de *Aŭtomobiloj* kaj *Bicikloj*; dum la Sekcioj de *Mekaniko*, *Plasto*, *Kontoro Moderna* ktp. ricevos nombron da ekspozantoj ĝis nun ne atingitan. Estas 25 aliaj Sekcioj. La kunokazado de *Gentaj Floralioj*, la *Internacia Foiro Brusela* kaj la Lille'a manifestacio certe allogos per komuna forto neordinaran nombron da vizitantoj enlandaj kaj eksterlandaj.

La Organiza K-to propraniciate starigos specialan standon, kie oni elmontros Esperantajn gazetojn, donos informojn kaj prenos adresojn de interesatoj pri Esperanto. **La esperantistoj reciproku tiun malavaran elpaŝon per amasa, aktiva vizitado!**

DONACOJ AL CED

	£	ŝ.	p.
Sveda Esperanto-Federacio,			
Svedujo	25	0	0
Anonima donacinto, Britujo ..	5	0	0
F-ino Andrée Romand, Francujo	3	0	0
S-ro Generalo Bastien, Francujo	3	0	0
S-ro Watier, Francujo ..	3	0	0
S-ino L. E. Blacklock, Britujo..	10	0	
S-ro O. Olsson, Svedujo ..	2	15	2
Elleston Boys' School, Britujo..	10	0	
S-ino E. B. Knight, Britujo ..	5	0	
S-ro A. Llinás Bellvehí, Kanariaj			
Insuloj	3	6	



A. O. Bünemann, Ak.

Kun sankta vervo en mieno,
li kuras al Hamburg-haveno.
Lin gvidas la deviza vorto :
Ide' interna—por eksporto !



Anonima donacinto, Britujo ..	5	0	0
S-ro J. Brownlee, Britujo ..	4	0	
Anonima donacinto, Britujo ..	10	0	
S-ino J. W. Langtree, Britujo..	10	0	
Stato la 8-an de Marto, 1955 ..	£49	7	8

Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacoj por CED oni povas sendi al UEA, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Britujo, aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 rue de Chabrol, Paris X, Francujo, aŭ al CED mem.



Enigma Konkurso N-ro 97

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 89 Av. du Sacré Coeur, Brussel-Jette, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj :)

N-ro 215 : Tempo toleras, sed vero aperas. trobadoro - eŭfemismo - monomanio - patriarko - obligacio - tribunalo - okcidento - labirinto - enverguro - regimento - agronomio - septembro - saksofono - ekvinokso - diktatoro - vermiĉelo - ekspansio - renesanco - ortodoksa - akvaforto - provizora - ekspluati - romantika - aŭtokrato - spontanea.

N-ro 216 : Ne rapidu kun vortoj, rapidu kun faroj. Luksa la vesto, sed malplena la poŝo. La luno ne aŭskultas, kiam hundo ĝin insultas. Faru hodiaŭ kion vi povas, morgaŭ vi eble okazon ne trovos. Vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas.


Gajnis la premiojn post kontrolo de la 93-a konkurso : S-ro L. Sandberg (Norv.) 122, F-ino J. J. v. Thiel (Ned) 110, S-ro A. Pittoors (Belg) 110 p.

Enigmo N-ro 219 : Krucvort-enigmo. Figuro : kvadrato (15 × 15) sen nigraj fakoj. Horizontale : 1. nordpolusa - granda duhufa remaĉulo (R) - malpufa (R). 2. aperigi bildon per ĥemiaj banoj (R) - senenergia (R) - fari maŝteksaĵon. 3. kolomboj faras tion - daŭre esti en sama loko - malice mokridi (R). 4. agokampo (R) - puto povas esti tia (R) - ia ordono. 5. peco de teksto (R) - pulmomalsano - azia lando (R). 6. ia enigmo (R) - prilabori paston - festotago. 7. okkrura artikulo (R) - cifer

(R) - teatra ludisto (R). 8. ĥemie plipurigi (R) - forte tuŝi la animon (R) - tiel oni ofte vojaĝas en tramo. 9. gusto de ia likvoro estas tia - definitive fiksi volon (R) - materio el kiu oni faras juvelojn (R). 10. antikva malgranda roma monero (R) - planto kun grandaj ordinare violaj floroj - kapoparto. 11. forigo de unu aŭ kelkaj nenecesaj vortoj (R) - ĉiam verda arbeto (R) - troviĝas sur termometro. 12. konifero (R) - surtera viskeca molusko (R) - speco de karmo (R). 13. moka dirmaniero (R) - ago per kiu gasoj eliĝas nevideble - preta por defendi (R). 14. akute pike - longa rekta ornama sulko (R) - homo ne aparte kompetenta. 15. sportejo (R) - tuto de la disĉiploj de iu majstro - ili konsistigas skeleton. Vertikale : 1. H-1a, H-6a, H-11a ; 2. H-2a, H-7a, H-12a ; 3. H-3a, H-8a, H-13a ; 4. H-4a, H-9a, H-14a ; 5. H-5a, H-10a, H-15a ; 6. H-1b, H-6b, H-11b ; 7. H-2b, H-7b, H-12b ; 8. H-3b, H-8b, H-14b ; 9. H-4b, H-9b, H-14b ; 10. H-5b, H-10b, H-15b ; 11. H-1c, H-6c, H-11c ; 12. H-2c, H-7c, H-12c ; 13. H-3c, H-8c, H-13c ; 14. H-4c, H-9c, H-14c ; 15. H-5c, H-10c, H-15c.

Ekzemple V10=pulmomalsano - planto kun grandaj ordinare violaj floroj - tuto de la disĉiploj de iu majstro.

Enigmo N-ro 220 : Reordigu la litergrupojn sub ĉiu numero tiel ke



Nia Forumo

Ni invitas la legantojn paroli libere pri temoj, kiuj interesas ilin.
Tro longajn leterojn ni eble iom koncizigos.

Logiko kaj lingvo

En la disputoj pri tiu aŭ alia punkto de la Esperanta gramatiko, ofte oni alvokas la logikon, kiel plej superan kriterion. Tio montras, ke la alvokantoj havas malĝustan ideon pri la rilatoj inter la logiko kaj la lingvoj, inkluzive de la vivaj laŭplanaj lingvoj, kiel Esperanto kaj *nygorsk* (nov-norvega).

Efektive, la ideo, ke la gramatiko estas “logiko aplikata”, regadis dum la dekoka kaj granda parto de la deknaŭa jarcentoj, kaj havis sian konkretigon en la vanaj klopodoj starigi “universalan gramatikon” kun fundamentaj reguloj validaj por ĉiuj lingvoj.

Sed la kompara kaj historia lingvo-

ili formas esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. ado - ajf - dok - edo - ilo - nas - ona - onn - pan - rez - zof.

2. doĝ - est - fen - ire - ont - ost - pel - por - ral' - ral' - ro - umi - ven - zer.

3. aĝu - asd - eks - fos - ĝin - ĵet - loj - mal - nea - non - saĝ - ŝto - tin - ulo.

4. ĉan - dbo - dol - efi - iko - kon - ler - mal - nad - nan - nse - oha - rad - vas.

5. ajn - and - dak - ego - egr - ito - jor - kap - ojd - ojk - red - ric - roj - sin - ult.

scienco kaj la pli kaj pli profunda esploro de ekstereŭropaj lingvoj forlasigis tiujn senutilajn provojn.

Ĉiam pli disvastiĝas kaj firmiĝas la konvinko, ke ne la logiko kondiĉas la lingvon, sed—male—la lingvo kondiĉas la logikon. Mi ne volas citi multe da nomoj, sed tion plene pruvis la lingvisto Viggo Brøndal (en *Encyclopédie Française*: I. *L'outillage mental*: *Pensée, Langage, Mathématique*, Parizo 1935) kaj nia estinta duon-samideano prof. Otto Jespersen, la matematikisto-filozofo Bertrand Russell kaj mia eminenta amiko Guido Calogero, universitata profesoro pri filozofio, (*Le Origini della logica classica* en *Annali della r. Scuola normale di Pisa*, serio II, vol. V), kie li, interalie, ja diras: nur pro la ekzisto de l' verbo *einai* la helenoj “ekpensis ne nur pri la ‘ento’, sed pri la pli granda parto de tiuj formalaj skemoj, kiuj poste konsistigos la konstruon de la ‘dialektiko’ kaj de la ‘logiko’, kaj kiuj neniam naskiĝus en ilia konscio, se ilia lingvo ne konus, dekomence, la ĉeeston kaj la kontraŭecon de ‘estas’ kaj ‘ne’.”

Ĉiu lingva tipo formas “fermitan sistemon” tute konsekvenca kaj obeas proprajn logikajn regulojn, neaplikeblajn al aliaj lingvotipoj.

Cetere, kiun logikon oni apliku? La klasika, de aristotela deveno, kiu dominis ĝis nelonge, estas nur unu el la eblaj logikaj sistemoj; kaj lingvo, perfekta laŭ iu ajn el tiuj

sistemoj, malhavirus la plej gravan econ de vivanta lingvo : ĝi ne povus esprimi la sentimentojn.

Oni relegu la interesan verketon de D-ro E. Privat, *Esprimo de sentoj en Esperanto* (Genevo 1931), kaj oni vidos kiom la ĉiutaga, impresfika lingvo malproksimiĝas de la t.n. komuna logiko.

Aliflanke, estas sciate, ke en la klasika logiko la konkludo estas rigore kondiĉita de la asertoj eldiritaj en la premisioj, kiuj tamen, funde esplorataj, ofte pruviĝas senbazaj.

Estas facile komprenebla la fakto, ke ĝenerale, pro kutimo, oni konsideras logika la konstruon de la gepatra lingvo, laŭ la paradigmoj de la latina gramatiko; paradigmoj, cetere, kreitaj de la humanistoj dum la Renesanco laŭ la lingvouzo de Cicero, tiel

diferenca de la ĉiutaga lingvo parolata de la romanoj.

La sola rimedo por korekte uzi la formojn de iu ajn lingvo estas do esplori ĝian uzadon kaj aranĝi la lingvajn faktojn laŭ ĝia interna sistemeco. Estas do prava Prof. Waringhien, kiam li starigas la regulojn pri *-ata/-ita* laŭ la perfekte konsekvenca uzado de Zamenhof; dum, por pravigi la german-holandan teorion pri tiuj formoj oni devas nepre senvalorigi la verkojn de Zamenhof, subkomprenigante ke tiu mallerta, nesperta Esperantisto tre ofte eraradis . . .

Sed, tiuokaze, mi devas sincere konfesi, ke mi preferas erari kun Zamenhof, ol malerari kun samideano Tielkajtiel aŭ Ajnulo !

Stefano la Colla, Ak.

INTERNACIA FERIO-SEMAJNO en JUGOSLAVIO, 16-23 Julio 1955

La VOJVODINA ESPERNATISTA LIGO en Novi Sad

(asocio de jugoslaviaj esperantistoj en la provinco Vojvodina) aranĝos internacian ferio-semajnon dum la 16-23 de julio sur la malnova fortikaĵo PETROVARADIN ĉe la riverego DANUBO, kiu nun estas aranĝita kiel amuz-ĝardeno. Okazos prelegoj pri Jugoslavio, interesaj ekskursoj, ĉiutaga banado en la konata "strando", amuzaj vesperoj, vizitoj al muzeo, teatro ktp.

La partoprenantoj de la ferio loĝos en komforta tendaro aŭ hoteloj. La manĝado okazos en la moderna restoracio de la fortikaĵo. Maten-, tag-kaj vespermanĝo kun abunda da fruktoj.

Prospekto kaj aliĝilo estas haveblaj kontraŭ 1 respondkupono aŭ UL-stelo (laŭeble). Oni anoncu sin kiel eble plej baldaŭ, ĉar estas akcepteblaj maksimume nur 30 partoprenantoj.

**Adreso: VOJVODINA ESPERANTISTA
LIGO, NOVI SAD, Zmaj Jovina 4/II—
JUGOSLAVIO**

FERIU EN NEDERLANDO !

Partoprenu la Internacian Kulturalan Semajnon

Nederlando, dek jarojn post la Liberiĝo de la 22-a ĝis la 29-a de Julio 1955 (ĝuste antaŭ la UEA- kaj SAT-Kongresoj) okaze de la grandioza

Nacia Ekspozicio en

ROTTERDAM "E 55"

organizita de Roterdama Esperanto-Komitato en belege situanta Konferenc-ejo en la kamparo apud Rotterdam.

Vidu artikolon en tiu ĉi numero !

Kotizo, inkluzive ĉion (restadon, manĝojn, prelegojn, ekskursojn, kulturajn aranĝojn ktp.) : 100.— ned. gld.

Petu informojn kaj aliĝilon ĉe :

**F-ino A. C. Obbes, sekr. R.E.K.,
Boezemlaan 24 b, Rotterdam N**

aŭ

**F-ino M. H. Vermaas, prez. R.E.K.,
Nieuwe Binnenweg 70, Rotterdam C**



40-a Universala Kongreso de Esperanto

30.VII-6.VIII, 1955, BOLONJO, Italujo

Adreso : CIT, Piazza Nettuno 2, BOLOGNA, Italujo

Banko : Banco di Napoli, Bologna, Konto 2824

Ĝiro : Grupo "A. Tellini", Piazza Medaglie d-Oro 3, N. 8/20620

N-ro 5

OFICIALA KOMUNIKO

Aprilo 1955

Kotizoj : Post 31 marto la kotizoj plialtiĝas. Bonvolu konsulti la tarifon. Aliĝiloj haveblaj ĉe Landaj Asocioj de UEA kaj la Kongresa Oficejo (adreso ĉisupre). En la adreso nepre citu la nomon "40-a Universala Kongreso de Esperanto".

Limdato : Kiel kutime, la limdato por aliĝo estas la 30-a de junio. Aliĝiloj devas esti ĉe la L.K.K. aŭ ĉe la Perantoj je tiu dato. En julio la administrantoj *fermas la kontojn* por ordigi la kalkulojn necesajn je kontrolo kiam alvenas la kongresanoj. Pagojn kiuj venos post 30 junio, ni skribas en "ŝvebantan" konton kaj redonas al la koncernaj personoj je alveno. Sendante monon zorgu do ke ĝi atingos la L.K.K. antaŭ la fino de junio. L.K.K. ne povas fari esceptojn de tiu praktiko.

Gazetaro Servo : Oficialaj instancoj, kiuj deziras ricevi dum la kongreso la bultenojn de la Gazetara Servo, bonvolu kiel eble plej baldaŭ sciigi tion al la L.K.K. por ke ĝi faru la necesajn antaŭzorgojn. Skribu adreson klare kaj indiku, ĉu oni deziras ilin (a) ĉiutage, (b) post la kongreso aŭ (c) ĉu iu persono (nomu lin) mem prenos ilin en la Gazetara Servo.

Infana Programo : Al ĉiu kongresano ĝis la aĝo de 15 jaroj la L.K.K. sendis specialan circuleron koncerne apartan aranĝon. Laŭ la respondoj la L.K.K. agos.

Junulara Programo : La L.K.K. projektas specialajn programojn en la vesperoj de dimanĉo, merkredo kaj jaŭdo de la kongresa semajno speciale por la junularo en la aĝgrupo 16-20 jaroj (aŭ iom pli). Dancado kaj distraĵoj. Skribu la L.K.K. ĉu vi havas intereson por tio.

Statistiko (ĝis 28 feb.) : Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrio 18, Belgujo 12, Brazilo 3, Britujo 75, Danujo 24, Finnlando 27, Francujo 170, Germanujo 83, Hispanujo 5, Italujo 208, Izraelo 1, Japanujo 1, Jugoslavio 41, Kubo 1, Maroko 18, Nederlando 113, Norvegujo 17, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Sudafriko 1, Svedujo 73, Svislando 24, Usono 10. Sumo el 27 landoj 937. Interesaj ciferoj : Nemembroj de UEA 21.9%; Instruistoj 18%; personoj sub 21 jaroj 7%.

Nome de la L.K.K.,

Mason Stuttard, K.K.S.

Statuto de U.E.A.

La Komitato de U.E.A. akceptis la statutproponon de Komitatano Jan Strönné, publikigitan en la marta numero, escepte de paragrafoj 27 kaj 29, kiuj ricevis la ĉi suban tekston. La Komitato decidis okazigi Ĝeneralan Voĉdonadon pri la statuto nun akceptitan de la Komitato.

*E. Malmgren,
Prez. de U.E.A.*

27. Rolo. La Komitato elektas inter siaj membroj Prezidanton, unu aŭ du Vicprezidantojn, Ĝeneralan Sekretarion kaj du ĝis kvar pliajn membrojn de la Estraro, rajtas nomi Honoran Prezidanton kaj Honorajn Membrojn, difinas la ĝeneralan agadon de U.E.A., decidas pri aliĝo de Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj pri kontraktoj kun Fakaj Asocioj, decidas pri la Regularoj, aprobas la budĝeton kaj ekzamenas la financojn de la Asocio, decidas pri la agado de la Estraro, decidas pri la aferoj ne rezervitaj al aliaj instancoj.

29. Rolo. La Estraro, kiu estas respondeca al la Komitato, elektas la Redaktoron de la *Revuo Esperanto*, nomas kaj maldungas la Administranton de Centra Oficejo (CO) kaj la direktorojn aŭ administrantojn de eventuale aliaj oficejoj, okazigas la Universalajn kaj aliajn Kongresojn kaj Konferencojn, kreas novajn servojn kaj aranĝojn, prezentas al la Komitato proponon pri la budĝeto kaj respondecas pri la financoj de U.E.A., plenumas la decidojn de la Komitato.

Sendu kvanton da poŝtmarkoj kaj vi ricevos saman kvanton da francaj poŝtmarkoj. Letendre, Duguay-Trouin 25, LE HAVRE, Francujo.

“Bona Stelo”, 31 rue Pêcherie, Romans (Drôme), Francujo, urĝe bezonas ĉ. 20 adresojn de seriozaj gekorespondantoj, ĉefe junaj.

Fondaĵo Montevideo

Financa raporto

Enspezoj

Donacoj	£	ŝ.	p.
	1,174	7	10

Elspezoj

Pretigo de dokumentoj k.t.p.	£	ŝ.	p.
Elspezoj por la reprezentado ĉe la konferenco :			
Vojaĝelspezoj ..	447	18	1
46-taga restado en Montevideo	214	0	0
Kompenso ..	150	0	0
		811	18 1
Ekspozicio en Montevideo		250	0 0
		£1,271	16 5

Manko en la Fondaĵo = £97 8ŝ. 7p.
U.E.A. kun danko akceptos donacojn por forigi tiun deficiton.

ROZOJ KAJ URTIKOJ

tradukita kaj originala poemaro
de

Poul Thorsen


Antaŭparolo de W. Auld

66 poemoj : 117 paĝoj : 34 vinjetoj
Prezo (bindite) 11ŝ., plus sendkosto 6p.

Por revendistoj kutima rabato

Komuna Konversacia Klubo
Randbølgej 4, Kopenhago F, Danlando
Havebla ĉe U.E.A.

Vidu lastnumeran recenzon.



Radio

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	14.50–15.00	Ljubljana. 327m., 211m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 25.61m. P. D-ro Baur.
	19.15–19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
Merkredo	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo
	22.05–11.15	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur 13-IV, 10-V). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	06.45–06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-OUce, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.45–23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	19.15–19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 370m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	18.45–19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 1-IV, Nia kvincenta jubilea dissendo ; 6-IV, Mondo esperantista ; 8-IV, La sep paroloj de Jesuo dum la agonio ; 13-IV, Informoj el Italujo ; 15-IV, La lingvo Esperanto 38 jarojn post la morto de ĝia elpensinto ; 20-IV, Opero "Vilaĝana Kavalireco" de Pietro Mascagni ; 22-IV, Itala belarta urbo Romo ; 27-IV, Projekto de nova kalendaro laŭ teksto de A. Ribot ; 29-IV, Leterkesto kaj bibliografio.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 270

1an de marto 1955

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de februaro kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de februaro 1954 :—

	1954	1955
Asociaj membroj ..	1694	760
Individuaj membroj :		
MJ 578		410
MA 2882		2348
MS 542		492
Patronoj 6		7
DM 269		284
HM 56		57
	4333	3598
	6027	4358

DELEGITOJ

Aŭstralio

Bunbury (Western Australia). D : S-ino R. McGrath, 11 Money Street. Tel : Bunbury 931.

Brazilo

Macaé (Est. do Rio). D : W. da Silva, Av. Rui Barbosa 741. Tel : 352.

Francujo

Auxerre (Yonne). VD : A. Bourry, 18 Rue Faidherbe.

Baugé (M. et L.) D : E. Bidoit, Esperantista Kulturdomo, Château de Grésillon. Tel : 34.

Caen (Calvados). D : J. Duthilleul, 35 rue de Bayeux. Tel : 57-04.
FD (Ŝakludo) : la D.

Domfront (Orne). FD (Katolikismo) : G. Véron, Place de la Petite Bruyère.

St. Pol Sur Mer (Nord). D : vakas.

Germanujo

Neustadt/Weinstr (Rheinland-Pfalz). FD (Instruado) : Dipl-Inĝ. J. Schneider, Karolinenstrasse 47.

Italujo

Bologna (Emilia). FD (abelkulturo) : vakas.
Firenze. VD : S-ino D. Cappelli, Via Venezia 10. Tel : 297016.

Mantova (Lombardio). VD : F. Zacche, Via Portazzolo 1. Tel : 2924.

Postoia (Toscana). D : U. Stoppoloni, Viale Vitt. Veneto 5.

Verona. FD (Turismo) : G. Fiorini, Via Zaccaria Betti no 2.

Japanujo

Matumoto-si (Nagano-ken). D : H. Hasimoto, Yotuya-mati 1995. Tel : 793.
FD (Silkraŭpokulturo) : la D.

Rodezio Norda

Lusaka. D : vakas.

Usono

Washington (D.C.) FD (Sociologio) : D-ro W. Solzbacher, 6030 Broad Street, Washington 16. Tel : OLiver 2-1333.

Yonkers (N.Y.) D : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Costa, S-ro L. J., Santos, Brazilo
Corrêa, S-ro E., Porto Alegre, Brazilo
Hicks, S-ro S. W., Bayswater, Aŭstralio
de Anda, S-ro Inĝ. M.A., México, Meksikio

PATRONOJ 1955

5. Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo
6. Santos, S-ino Z. C., Teofilo Otoni, Brazilo
7. Toms, S-ro C. H., Freshwater, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1955

198. Nogue, S-ro J., Parets del Vallés, Hispanujo
199. Llinás Bellvehí, S-ro A., La Laguna, Kanariaj Insuloj
200. Dormont, S-ro L., Brooklyn, N.Y., Usono
201. Carlson, S-ro F., Seattle, Wash., Usono
202. Smart, S-ro H. W., Brooklyn, N.Y., Usono
203. Sayers, S-ro J. D., Lillie, La., Usono
204. Sayers, S-ino E. T., Lillie, La., Usono
205. Ayres, S-ro C. N., Saugus, Mass., Usono
206. Futran, S-ro J., New York, Usono
207. Preedy, S-ro G. L., Little Witcombe, Britujo
208. Hehir, S-ro C. P., Kalgoorlie, Aŭstralio
209. Chinn, S-ro C. G., Welwyn Garden City, Anglujo
210. Farrell, Pastro W., Blackburn, Anglujo

211. Laurie, S-ino W., Bournemouth, Anglujo
212. Aitchison, S-ro G. R., Northampton, Anglujo
213. Beaumont, S-ro B. B., Huddersfield, Anglujo
214. Broadway, S-ro B. J., Bournemouth, Anglujo
215. Hanson, S-ro C. G., Exeter, Anglujo
216. Pearson, S-ro M., Sheffield, Anglujo
217. Seddon, S-ino R., Southport, Anglujo
218. Tweedie, O., Bournemouth, Anglujo
219. Laurie, S-ro E., Bournemouth, Anglujo
220. Couwenberg, S-ro Fr., Blankenberge, Belgujo
221. Goossens, S-ro G., Lokeren, Belgujo
222. Meurrens, S-ino A., Leuven, Belgujo
223. Piot, S-ro F., Leuven, Belgujo
224. Roose, S-ro F., Brugge, Belgujo
225. Van Gindertaelen, D-ro T., Mechelen, Belgujo
226. Vanmeerbeek, S-ro A., Tirelemont, Belgujo
227. Boute, F-ino C., Matadi, Belga Kongo
228. Lacalendola, S-ro Prof. A., Bari, Italujo
229. Baas, S-ro P. W., Amsterdam, Nederlando
230. Bijmolt-Ochtman, S-ino C., Amsterdam, Nederlando
231. Douglas, S-ro H. F., Rijswijk, Nederlando
232. Hendriks, S-ro P., Leeuwarden, Nederlando
233. Kleynen, S-ro G. A. M., Rotterdam, Nederlando
234. Muller, S-ro J. L., Bussum, Nederlando
235. Ravestein-Basters, S-ino J. M., Den Haag, Nederlando
236. van Zeyl, S-ro G. H. H., Arnhem, Nederlando
237. Nii, S-ino A., Toronto, Kanado
238. Bozilov, S-ro T., Toronto, Kanado
239. Tuch, F-ino R. M., Toronto, Kanado
240. Charlet, F-ino J., Sain Bel, Francujo
241. Dedieu, F-ino F., Toulouse, Francujo
242. Forgeau, S-ro J., La Rochelle, Francujo
243. Romand, F-ino A., Paris, Francujo
244. Trésorier, S-ino J., Besançon, Francujo
245. Hautmann-Lüthi, S-ino M., Wallisellen Svisujo
246. Belinfante, D-ro F. J., Lafayette, Ind., Usono
247. Mitschke, S-ro F., St. Peterburg, Fla., Usono
248. Van Bay, S-ro N., T.O.E., Francujo
249. Mila, S-ro E., Drancy, Francujo
250. Fabert, S-ro M., Chelles, Francujo
251. Lagrange, S-ino E., St. Germain-en-Laye, Francujo
252. Morgand, S-ro, Montpellier, Francujo
253. Petit, S-ro P., Rosny-sous-Bois, Francujo
254. Doering, F-ino J., Berlin-Tegel, Germanujo
255. Dücker, S-ro A., Bebra, Germanujo
256. Carstensen, S-ro T., Ahrensböck, Germanujo
257. Engler, F-ino M., Mainz, Germanujo
258. Epstein, S-ro F., Hamburg, Germanujo
259. Flick, S-ro W., Bad Salzuflen, Germanujo
260. Gerwin, S-ro R. Jr., Lobberich b. Krefeld, Germanujo
261. Gründler, S-ro M., Frankfurt, Germanujo
262. Janssen, S-ro F., Oldenburg, Germanujo
263. Kind, S-ro E., Bonn, Germanujo
264. Kreutzberg, S-ro Fr., Köln, Germanujo
265. Maywald, S-ro F., Passau, Germanujo
266. Mutschler, D-ro med. W., Klosterreichenbach, Germanujo
267. Oeste, S-ro W. Th., Köln, Germanujo
268. Sandrock, S-ro O., Essen, Germanujo
269. Schäfer, S-ro A., Dortmund, Germanujo
270. Schellberg, S-ro H., Köln, Germanujo
271. Vosteen, S-ro K., Wüstring, Germanujo
272. Wanderer, S-ro K., Tailfingen, Germanujo
273. Wehrheim, D-ro H., Hildesheim, Germanujo
274. Wuenschel, S-ro H. Ph., München, Germanujo
275. Alemán Ruiz, D-ro A. Habana, Kubo
276. Guerra Ibarra, S-ro R., Santiago de Cuba, Kubo
277. Ringstad, S-ro G., Torp, Norvegujo
278. Aarsaether, S-ro E., Oslo, Norvegujo
279. Myrvoll, S-ro M., Nygardsjøen, Norvegujo
280. Norvall, S-ro K., Oslo, Norvegujo
281. Rokkan, S-ro G., Narvik, Norvegujo
282. Rosbach, S-ro H. A., Hasvik, Norvegujo
283. Jensson, S-ro A., Oslo, Norvegujo
284. Constantini, S-ro L., Milano, Italujo
285. Sgroi, S-ro R., Catania, Italujo
286. Grahovac, S-ro I., Beograd, Jugoslavujo
287. Bloemendal, F-ino S. W., Lochem, Nederlando
288. van Delden Szn., S-ro Mr. P., Deventer, Nederlando
289. Geerlings-la-Croix, S-ino M. C., Amsterdam, Nederlando
290. Knol, D-ro G. T., Coevorden, Nederlando

291. Roelofs, S-ro J. J., Soest, Nederlando
 292. Woessink, S-ro E. J., Arnhem, Nederlando
 293. Guibert, S-ino, Port Lyautey, Maroko
 294. Apcher, S-ino G., Meknès, Maroko
 295. Cazaudarré, S-ro F., Sidi-Yahia-du-Rharb, Maroko
 296. Cellier, S-ro P., Meknès, Maroko
 297. Forté, S-ro A., Jerada, Maroko
 298. Nagy, S-ro A., Montevideo, Urugvajo
 299. Barbieri, S-ro R. A., Montevideo, Urugvajo
 300. Cao, S-ro V. L., Montevideo, Urugvajo
 301. Garcia, S-ro R., Montevideo, Urugvajo
 302. Klein, S-ro A., Montevideo, Urugvajo
 303. Pons, S-ro V. E., Colonia, Urugvajo
 304. Zeballos Morales, D-ro R., Florida, Urugvajo
 305. Jovović, S-ro P., Sarajevo, Jugoslavio
 306. Geyer, S-ro C. J., Bilthoven, Nederlando
 307. Hoekma, S-ro A., Den Haag, Nederlando
 308. Mabesoone, S-ro P. M., Amsterdam, Nederlando
 309. Postma, F-ino T., Rotterdam, Nederlando
 310. Stein, F-ino El., Seelbach, Germanujo
 311. Dahlmann, S-ro E., Berlin-Frohnau, Germanujo
 312. Fritsch, D-ro E., Clenze, Germanujo
 313. Huch, S-ro W., Mainz, Germanujo
 314. Jocham, S-ro G., Stuttgart, Germanujo
 315. Schneider, S-ro F., Niedermarsberg, Germanujo
 316. Selle, S-ro A., Hage, Germanujo
 317. Treude, D-ro W., Munchen, Germanujo
 318. Wolff, F-ino A., Rendsburg, Germanujo
 319. Prince, S-ro A., Letchworth, Anglujo
 320. Allen-Smith, S-ro H. W., Watford, Anglujo
 321. Bishop, S-ro W. O., Whitstable, Anglujo
 322. Bridger, S-ro H. J., Bexleyheath, Anglujo
 323. Cunningham, S-ro W., West Wemyss, Skotlando
 324. Edmondson, S-ino E., Bingley, Anglujo
 325. Gardner, S-ro C. W., Sheffield, Anglujo
 326. Grice, W-ro W., Darwen, Anglujo
 327. Hockey, F-ino M. J., Barrow-in-Furness, Anglujo
 328. Holden, S-ro J., Rochdale, Anglujo
 329. Langham, S-ro W., Iver, Anglujo
 330. Millidge, Pastro R. G., Sutton, Anglujo
 331. Miskimmon, S-ro W. A., Hamilton, Skotlando
 332. Moberley, S-ro E. W., London, Anglujo
 333. Murray, S-ro R., Thorpe Bay, Anglujo

334. Smith, S-ro N. R., Manchester, Anglujo
 335. Sproxton, S-ro R. A., Hull, Anglujo
 336. Williams, S-ro N., Manchester, Anglujo
 337. Zeiner, S-ro B. R., Barry, Kimrujo
 338. Rayner, S-ro R. W., Nairobi, Kenjo
 339. Donner, S-ro W. A., Bedford, Ohio, Usono
 340. Eisele, S-ro J., St. Louis, Mo., Usono

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso :

F. Conchado 7ŝ., A. F. Doneis 7ŝ., H. C. Jenkins £2 3ŝ., W. H. King £1, C. Covall £1, W. Cunningham 5ŝ., S-ino A. Wignall 5ŝ.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo :

M. Pearson £2 2ŝ., P. Anserer 2ŝ. 8p., D-ro E. Wüster £1 6ŝ. 6p., Centra Dana Esperantista Ligo £25 13ŝ.

Sumo ĝis 28.2.55 : £1,204 5ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

JOHN C. RAPLEY, *Sekretario.*

Internacia Konkurso 1955

Stato je la 28a de februaro

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Izraelo ..	250	250	100.0
2.	Japanujo ..	900	750	83.3
3.	Germanujo ..	3700	3060	82.7
4.	Aŭstralio ..	1000	815	81.5
5.	Finlando ..	2500	2025	81.0
6.	Kanado ..	350	275	78.6
7.	Urugvajo ..	300	230	76.7
8.	Nederlando ..	4600	3495	76.0
9.	Svislando ..	1600	1170	73.1
10.	Francujo ..	5100	3552	69.6
11.	Britujo ..	9200	6470	66.7
12.	Meksikio ..	250	160	64.0
13.	Sarlando ..	250	160	64.0
14.	Hispanujo ..	1600	990	61.8
15.	Portugalujo ..	500	275	55.0
16.	Jugoslavujo ..	1750	905	51.7
17.	Danlando ..	2500	1215	48.6
18.	Sudafriko ..	350	155	44.3
19.	Kubo ..	250	110	44.0
20.	Italujo ..	2900	1260	43.4
21.	Norvegujo ..	2200	860	39.1
22.	Usono ..	2300	888	38.6
23.	Irlando ..	250	80	32.0
24.	Brazilo ..	6400	1855	29.0
25.	Aŭstrujo ..	1200	285	23.7
26.	Svedujo ..	5900	1360	23.0
27.	Maroko ..	750	165	22.0
28.	Belgujo ..	2100	420	20.0
29.	Islando ..	350	55	15.7
30.	Novzelando ..	800	90	11.2

ANONCETOJ

Kosto : *du pencoj por ĉiu vorto, aŭ 1 respondkupono por ĉiu duo da vortoj.*
La oficiala aperdato de la revuo estas la 1-a de ĉiu monato. Anoncetoj devas atingi la Centran Oficejon kvin semajnojn antaŭ la aperdato de la celata numero.

Kaj dum ili priparolis tion, li mem staris meze de ili, kaj diris al ili : Paco al vi.
S-ta Luko 24. 36.

Henry Thomas Hamblin. Dio Nia Centro Kaj Nia Deveno : 48-paĝa libreto pri la diversaj ecoj de Dio. Taŭga por meditado. Prezo unu ŝilingo (tri respondkuponoj), afrankite. Hipsley, 17 Abbots Road, BIRMINGHAM 14, Britujo.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. lito kaj matenmanĝo po 12ŝ. 6p. por ĉiu nokto. Prezroj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, "Flat Four", 1 Warrington Crescent, LONDON W.9, Anglujo. Telefono CUNningham 4487.

Helpu nian lingvon. Mi provas formigi "Esperanto" grupon kaj elkore petas—sendu esperantaĵojn por helpi farigi membrojn. Mi esperante dankas. Frank Scarborough, Delegito, 6 Bedford St., HULL, Anglujo.

Mondvojaĝisto revenanta al Eŭropo donos libertempojn al junaj esperantistoj en iliaj landoj. Simpkins, Midland Bank Ltd., BRACKNELL, Berks., Anglujo.

Adressaĝo. *S-ino E. Gregory de Bodmin al : 35 Hillcrest, Peasedown St. John, BATH, Somerset, Anglujo.*

Kontraŭ sendaĵo de esperantaĵoj por ekspozicio kiu okazos la 19-an de majo (afiŝoj, gazetoj, turismaj broŝuroj, poŝtkartoj, kovertoj, k.t.p.) ni sendos poŝtkartojn aŭ francajn poŝtmarkojn, laŭ via deziro kaj nia ebleco. Adreso : Lucien Desnos, St. CLAUD, Charente, Francujo.

Kiuj alilandanoj volus senpage ĉeesti la esperantan semajnon en nia vilaĝo (16-a ĝis 22-a de Majo) ; nur unu el ĉiu lando kaj ne parolante franclingve. Skribu—Lucien Desnos, St. CLAUD, Charente, Francujo.

Geinstruistoj. Gelernantoj atentu ! Por ekspozicio sendu gazetojn presitajn ĉe la lernejoj—por ĉiu sendaĵo vi ricevos similaĵon el Francujo. Adreso Lucien Desnos, St. CLAUD, Charente, Francujo.

Tridek gekomencantoj 14 ĝis 18 jaraj deziras korespondi kun la tuta mondo.

Bonvolu skribi multnombre al la kursgvidantino : Ljubica Frelj, Gimnasija, BJELOVAR, Jugoslavio.

29-jara instruisto intencas pasigi kelkajn monatojn laborante en Nord-Eŭropo. Celas : perfektigi lingve. Parolas : Esperante, Germane. Renzo Porceddu, Via Lepanto 43, CAGLIARI, Italujo.

IBM-anoj korespondu kun Adreo Legoux, L'Arnaud, ROMANS (Drôme), Francujo.

Adacio Vieira, S. JOÃO DA MADEIRA, Portugal, akceptas proponojn por aĉeto de "Histoire de la langue universelle" kaj de "Plena Gramatiko" (dua eldono).

34 lernantoj (20-40 jaraĝaj) deziras korespondi. Kursestro José L. Aldeguer, Torrente Vidalet 42, 1/1, BARCELONA (12), Hispanujo.

Atentu Kluboj ! Ni deziras ludi ŝakon per korespondado kaj tiel pruvi la efikon de nia lingvo. Esperanto-Grupo Moyá, Str. Forn 19, MOYÁ (Barcelona), Hispanujo.

Deziras korespondi kun eksterlandanoj interŝanĝo belaspektaj poŝtkartoj S-ro José Ramao Filho, Caixa Postal 186, Caratinga, MINAS GERAIS, Brazilo.

Rotariaj Kluboj. Esperantista rotariano deziras korespondi kun kamaradoj el aliaj landoj. Jose Silvano Portes, Caixa Postal 54, Caratinga, MINAS GERAIS, Brazilo.

La plej bela—

La plej interesa—

La plej malmultekosta

rondvojaĝo tra Italujo antaŭ kaj post la Bologna-Kongreso estas organizota de Internacia Esperanto Turismo-Centro, Parizo.

De la Alpoj al la Napoli-insuloj
Petu la programon al la gvidonto :

**S-ro Lovati, Anĝelo,
MILANO, Via Lipari, 8**

nur 40 lokoj por geesperantistoj ne italaj

FREŜDATAJ ELDONAĴOJ DE U.E.A.

Matematika Terminaro, de D-ro C. M. Bean

39 paĝoj

afrankite 1ŝ. 8p.

Esperanto, bindita jarkolekto 1954

340 paĝoj

afrankite 10ŝ. 6p.

aŭ al membro-abonantoj de tiu jaro 5ŝ. 6p.

La Triumfo de Esperanto—la Februara numero de

Revuo Esperanto, escepte aĉetebla por propagandaj

kaj informaj celoj kontraŭ 1ŝ. 6p.

Eldonas kaj vendas

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Britujo

Ido kiel lingva projekto jam ne estas aktuala. Sed la idismo, la ŝajnlogiko ankoraŭ minacas difekti nian lingvon. Tial ĉiu esperantisto nepre legu la libron

Du Malsanoj en Esperanto

de H. A. de Hoog

El la recenzoj :

SAT-AMIKARO : Ne nur gramatikemuloj, sed ankaŭ laikuloj trovos en ĝi trafajn argumentojn kontraŭ la novmodajn esprimojn kaj ĝue tralegos ĉiujn paragrafojn forte stampitajn de agnosko al la admirinda lingva intuicio de Zamenhof

REVUO ESPERANTO : Nur ĉe ĝia apero en libra formo oni povis ĝuste taksi ĝian valoron espereble tio sufiĉos por instigi almenaŭ ĉiun instruiston kaj verkanton de lernolibro aĉeti ĝin.

140 paĝoj broŝurita. Bona papero. Prezo sv. Kr. 4.40 inkl. sendkosto de la eldoninto :

Erik Carlén,

Hällabrottet, Svedujo, poŝtgiro 343481,

aŭ ĉe via nacia Esp. eldonejo aŭ ĉe la libroservo de U.E.A.
Prezo 6ŝ., afranko 4p.

